F/330
DE 1990
007798
MEGYEI KÖNYVTÁR
SALGÓTARJÁN
40-17
P

HUNGARA VIVO

1
1983
13,— Ft



Eldonejo Műszaki alvokas vian atenton pri la sekvaj eldonaĵoj:

Bodóczky: Konstruado de glisiloj

Oravecz: Ekonomia hejtado de apartaj loĝdomoj kaj ripozdomoj

Novak: Muntadlibro de radioamatoroj

Féjja: 15 lecionoj pri filmado

Antalné: Metilaboroj per tekstilo kaj ledo

Timon: Modernaj konstrumanieroj: domo kun ĝardeno

Csabai: Jarlibro de magnetofonamatoroj 1982

Simon: Helplibro por konstruantoj de privata loĝdomo

FAKLIBRO ESTAS KUNLABORANTO, KIUN ELEKTAS VI!

La eldonaĵoj aĉeteblas aŭ mendeblas
— en „Műszaki" Könyváruház (1061 Budapest, Liszt Ferenc tér 9.)
— en Librovendejo „Technika" (1114 Budapest, Bartók Béla út 15.) kaj en la vendejoj de Ŝtata Librokomerca Entrepreno, de Librokomerca Entrepreno Klera Popolo kaj en tiuj de KÖNYVÉRT

ELDONEJO MŰSZAKI

HUNGARA VIVO

Revuo de Hungara Esperanto-Asocio
Adreso: Budapest
VIII.Kenyérmező u.6. H–1081
Poŝta adreso: Budapest
Pf. 193. H–1368
Aperas dumonate
XXIIIa jaro, 1983 n-ro 1
(107)

ENHAVO

Parolas la Honora Komitato 2
Radó, Gy.: Esti hungaro 4
D-ro Aradi, Cs.: La stepo Hortobágy – Nacia Parko 5
Rados, P.A.: Gaje en Budapeŝto 8
D-ro Broczkó, P.: Interkomputo '83 10
D-ro Botos, I.: Gustumu la hungaran! 11
László, I.: Departemento Tolna 12
D-ro Rátkai, Á.: Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado 7. 14
Gergely, M.: En krizo de komunikado 16
Huleŝ, A.: „Katoj kaj ĉevaloj" 19
Panoramo 20
Fenyvesi, E.: Revuo de revuoj 23
D-ro László, F.: Impona kaptaĵo en la paradiza fiŝejo 24
D-ro László, F.: „Protenvita" – ekspozicio pri medioprotekto 26
Fejes, M.: Literatura Metiejo 30
Mihalkov, G.: La argila kamelo 32
Fenyvesi, E.: Gaja paĝo 34
Bálint, Sz.: La ovo de Kolumbo 35
Recenzoj de V. *Benczik*, P. *Thorsen* 37
Mihalkov, G.: Ekzameno sen risko 39
Krucenigmo 39
Korespondi deziras, Leterkesto 40

Sur la frontpaĝo: Sporthalo Budapest – la Kongresejo (Foto de Z.*Fejér*)

Szabadság MGTSZ Nyomda, Gyál — 83-134

Rekordan partoprenantaron...

oni antaŭvidas por la 68-a UK en Budapeŝto, kvankam la nombro de la aliĝoj ĝis la fino de 1982 ne tute konfirmas tiun esperon. Ĉiukaze, la Sporthalo Budapest – kies foto dekoras nian frontpaĝon – estas preta akcepti eĉ ses mil homojn.

Tiu ĉi numero jam certgrade estas «kongresa numero». Tuj sur la sekvaj du paĝoj oni povas legi, kiel opinias membroj de la Honora Komitato de la 68-a UK pri la problemoj de internacia komunikado. Foliumante plu, sekvas bele ilustrita artikolo pri Hortobágy, la «pusto», t.e. stepo, la ĉefa Nacia Parko de Hungario. Estontaj kongresanoj nepre legu la artikolon «Gaje en Budapeŝto» por jam antaŭĝui sian restadon en la hungara ĉefurbo.

Ne nur por fakuloj estas interesa la raporto pri «Interkomputo-82»: tiu aranĝo pruvas, ke per sistema kaj kompetenta laboro oni povas atingi surprize grandajn rezultojn en la aplikado de Esperanto.

«Gustumu la hungaran!» – invitas Imre *Botos* al baza rapidkurso de la kongreslanda lingvo. Scivole ni atendas reagojn: kiom da legantoj interesiĝas pri nia ne tre facila idiomo?

Mihály *Gergely* prezentas en sia studo interesan proponon al la mondo pri la lerneja instruado de Esperanto. Li petas la legantojn, kiuj konsentas kun li, popularigi la ideon en sia lando, kaj eventuale skribi al nia redakcio pri la rezultoj.

En «Literatura Metiejo» nun temas pri traduko de Petőfi-poemoj: temo aktuala, ĉar dum la Budapeŝta Printempa Festivalo la hungara aktorino Gabi *Jobba* prezentos recitalon redaktitan el verkoj de kaj pri Petőfi.

Poeziamantoj legos verŝajne plezure specimenojn el la ĵus aperinta originala poemaro de Adalberto *Huleŝ:* «Katoj kaj ĉevaloj». Cetere, dum la lastaj monatoj eliris en Budapeŝto aro da libroj; represo de «La Verda Koro» de Julio *Baghy* (kun gramatiko kaj vortaro), du originalaj romanoj de István *Nemere:* «La fermita urbo» kaj «Blinda birdo». Prilingvaj eseoj de Bernard *Golden:* «Marĝene de la lernolibro», la majstre ilustrita bela fabelo de Gyula *Krúdy:* «La rozo de l' sultano», la originala novelaro de *Lorjak,* kaj mi povus ankoraŭ daŭrigi la liston, kiu ĝis la UK eĉ plu ampleksiĝos... Jen, unu plia kialo por veni al Budapeŝto: se Vi ankoraŭ ne aliĝis al la 68-a UK, faru tion tuj!

Parolas la Honora komitato...

Estas nobla tradicio de niaj Universalaj Kongresoj, ke la Loka Kongresa Komitato invitas al la Honora Komitato respondecajn kaj altrangajn politikistojn, simpatiantojn de Esperanto. Tiel okazis ankaŭ nun, dum la preparoj de la 68-a Universala Kongreso. La hungarlingva revuo de HEA, Világ és Nyelv *('Mondo kaj Lingvo') petis intervjuon de la membroj de la Honora Komitato. La tri demandoj, direktitaj al ĉiuj membroj de la Honora Komitato, estis la sekvaj:*

1. Kiuj pensoj, sentoj vekiĝis en vi, kiam vi akceptis la inviton esti membro de la Honora Komitato?

2. UNESKO deklaris la jaron 1983 Monda Komunika Jaro. Ankaŭ la Universala Kongreso pritraktos la problemojn de komunikado, kiel sian ĉeftemon. Vi estas ofta kaj aktiva partoprenanto de internaciaj rilatoj, ja tion postulas viaj profesio kaj ofico. Kiel vi pritaksas la komunikajn kaj ĉefe lingvajn malfacilaĵojn en la internacia komunikado?

Ferencné Cservenka, unua sekretario de la Hungara Socialisma Laborista Partio en Departemento Pest, vicprezidantino de la Parlamento:

1. Akceptante la inviton, mi konscias, ke ĝenerala tutmonda lingvo kiom multe faciligus klarigi la opiniojn inter la opaj popoloj. Mi estas konvinkita, ke ĝi moderigus ankaŭ la ŝovinismon kaj havus bonan efikon ĉefe inter la malgrandaj popoloj kaj naciaj minoritatoj.

2. En la internacia komunikado akumuliĝis multaj gravaj problemoj. Se en la Monda Komunika Jaro ni povus solvi almenaŭ kelkajn, ties efiko estus spertebla eĉ en la monda politiko.

En internaciaj konsultiĝoj, kiujn ankaŭ mi mem partoprenis, estis grava problemo, ke oni devis traduki ne nur en unu-du „mondlingvojn", sed foje-foje eĉ en 6-7 lingvojn. Onidire la Tero malvastiĝis, sed en tiaj aranĝaĵoj evidentiĝis, ke ĝi samtempe ankaŭ vastiĝis: ja ni renkontas homojn, eĉ el foraj landoj. Sekve la lingva situacio komplikiĝis.

3. Ni ne bezonas eltrovi ion novan, ja ekzistas jam la viva internacia lingvo, kiu tute konvene servas la interŝanĝon de pensoj, kaj estas nepre salutinda same kiel ĉiuj rimedoj, kiuj certigas ponton inter la popoloj. Vere multe helpus, se pli rapide disvastiĝus la komuna lingvo, kaj nepre gravas, ke UN pli profunde kaj zorge esploru la utiligon de Esperanto.

József Timmer, sekretario de la Nacia Konsilio de Hungaraj Sindikatoj

1. La esperantistoj estas fidelaj kunbatalantoj en la lukto por la nobla internacia celo, ke la diverslingvaj nacioj povu ankaŭ lingve pli bone interkompreniĝi, celante plivastigon kaj plifortigon de la internaciaj kontaktoj. Por mi estas honoro partopreni en tiu Komitato, kie ankaŭ mi volas kontribui al la plenumo de la kongresa programo. Tion mi faras, ĉar la lingvaj kaj kulturaj celoj de la monda Esperanto-movado servas klare la universalajn interesojn de la homaro, la pliriĉiĝon de la internaciaj rilatoj, sekve la konservadon de la paco.

2. En la internacia sindikata movado la lingvaj malfacilaĵoj same gravas kiel sur ĉiuj kampoj de la internaciaj rilatoj. Pro tio estas dezirinde, ke en la Monda Komunika Jaro la interŝtataj organizoj, reprezentantaj registarojn, kaj la diversaj internaciaj fakaj kaj sociaj organizoj finfine turnu seriozan atenton al la celoj kaj proponoj de la internacia Esperanto-movado. Ĉar UNESKO per la Monda Komunika Jaro volas meti en fokuson de atento la nunan situacion de la internacia komunikiĝo kaj informado, la enormajn teknikajn eblojn kune kun ties kontraŭdiroj, tial Esperanto-movado povus nun plenumi gravan rolon en la multfaceta pritraktado kaj klarigo de la problemoj de internacia komunikado. La movado per tio helpus konsciigi pri la graveco de la Monda Komunika Jaro; samtempe ĝi akcelus ankaŭ la proksimiĝon inter la diverslingvaj popoloj kaj homoj per la popularigo de la ideo pri la internacia lingvo.

3. Mi opinias, ke la solvo por transponti la multlingvecon estas realaĵo, sed ankoraŭ necesas multe lukti, por ke la respondecaj gvidantoj de la ŝtatoj rekonu: ni bezonas ankaŭ neŭtralan komunan lingvon.

La internacia sindikata movado estas interesita por disvastigi komunan lingvon, ja ĝi povus per tio fortigi, vastigi la kunlaboron inter la diverstendencaj sindikatoj. Ĝuste tial la sindikatoj subtenas en multaj landoj la disvastigon kaj enkondukon de la internacia lingvo.

La hungaraj sindikatoj jam de la komenco helpis Esperanto-movadon, tiun internaciskale gravan aferon, ja la unuaj hungaraj pioniroj estis plejparte intelektuloj, apartenantaj al la laborista movado, respektive lernemaj organizitaj laboristoj. La Nacia Konsilio de Hungaraj Sindikatoj daŭrigas tiun tradicion kaj ankaŭ nun multmaniere subtenas la hungaran Esperanto-movadon. Sed ni devas fari pluajn paŝojn al nia registaro, kaj – helpe de la internaciaj kontaktoj de la hungaraj sindikatoj – ankaŭ ni devas akceli la procezon, ke la afero de la internacia lingvo estu temo por la plej koncernataj interŝtataj forumoj celante kompleksan kaj kunordigitan solvon.

D-ro Mihály Simai, akademiano, prezidanto de la Hungara UN-Societo, honora prezidanto de la Monda Asocio de UN-Societoj

1. Jam longajn jarojn ekzistas intima kunlaboro inter la Hungara UN-Societo kaj Hungara Esperanto-Asocio, respektive inter la Monda Asocio de UN-Societoj kaj Universala Esperanto-Asocio, pro tio mi ĝoje akceptis

partopreni en la Honora Komitato. Kvankam ni ne sukcesis multajn punktojn realigi el la kunlaboro, tamen en la Monda Asocio kreskis la interesiĝo pri la internacia Esperanto-movado. Pri la internacia lingvo traktis jam ankaŭ la gvidantoj de la diverslandaj UN-Societoj, kiu rezultigis, ke en 1979 en Barcelono la Asembleo de la Monda Asocio de UN-Societoj decidis pri la kunlaboro kun la Landaj Sekcioj de UEA kaj pri la iniciato fakultative instrui Esperanton en la lernejoj. Jam plurfoje okazis kunsido inter altrangaj gvidantoj de la du mondaj organizoj. Tio multe helpis por pli bone konatiĝi kun la celoj de Esperanto-movado, kaj la ebloj kunlabori fariĝis pli klaraj.

En la nuna internacia situacio la Budapeŝta UK povos fariĝi aktiva partoprenanto de tutmonda dialogo, kiu transiras la demandojn pri lingvo kaj komunikiĝo. Ja ankaŭ la lingvo estas nur rimedo por kunlabori kaj kune serĉi la solvojn de problemoj. Mi esperas, ke ankaŭ tiu UK estos utila kontribuo al la internacia malstreĉiĝo kaj fortigo de la pacaj kontaktoj.

2. En UN la problemoj de la internacia komunikiĝo estas jam delonge inter la tagordaj punktoj. La komunikado estas cetere plurdimensia nocio. Ankaŭ la pritrakto estas multfaceta kaj kompleksa. La komunikado inkludas la interhomajn dialogojn same, kiel la funkciadon de tiuj grandegaj institucioj kaj teknikaj sistemoj, kiujn ni nomas amaskomunikiloj. Ĝi inkludas la diskutojn pri la senpera kapto de programoj de la eksterlandaj TV-satelitoj same, kiel la leĝojn de la funkciado de tiaj TV-satelitoj.

Nia starpunkto estas, ke la amaskomunikado devas fariĝi mondskale pli demokratia kaj oni devas vastigi la eblojn de la interhoma senpera komunikado. Ĉio ĉi devas servi ne al la malamikiĝo, konfliktiĝo, sed al la interpopola proksimiĝo, al la diskonigo de kulturaj kaj teknikaj rezultoj. Kaj en tiu ĉi procezo la malgrandaj nacioj ne estu en malavantaĝa situacio kompare al la grandaj nacioj. Mi pensas, ke la kongreso devos ankaŭ tiujn problemojn pritrakti kadre de la ĉeftemo.

3. Pri la solvo ankaŭ ni diskutas, kunpensadas. Tiuj ne estas facilaj demandoj. La lingvaj problemoj aperas ne nur inter la diverslingvaj landoj, sed ankaŭ en la multnaciaj landoj. Sed la ĉefa demando estas: Esperanto kiel ĝenerale uzata lingvo kiom estas reala celo? Kaj ĉu en la baldaŭa futuro ni povos kalkuli je tio, ke per internacia interkonsento plifortiĝos la lerneja instruado kaj pli vasta aplikado de Esperanto? Laŭ mia prijuĝo, Esperanto estus taŭga por transponti la lingvajn limojn kaj la diversajn naciajn kulturojn, sed tio okazos nur en la fora futuro. Ties realeco povos akceliĝi kaj vastiĝi, se Esperanto estos subtenata ankaŭ en la grandaj landoj. Cetere ankaŭ mi mem renkontis homojn en Usono, kiuj Esperanton rigardis sia korafero. La movado devas strebi en ĉiuj landoj por diskonigi la celojn kaj avantaĝojn de la lingvo al kiel eble plej vastaj tavoloj. Samtempe estu celo, ke ankaŭ UNESKO pritraktu la temon. Tiu celo meritas en nia lando la subtenon de la ŝtataj kaj sociaj forumoj.

D-ro József Pálfy, prezidanto de la Hungara Jurnalista Asocio

1. Kiel mondvaganta ĵurnalisto, mi ofte spertas, kiom malfacilas interkompreniĝi ne nur politike, sed ankaŭ lingve. Kvankam mi ne parolas Esperante, tamen mi rigardas realaĵo, ke ĝi estu komuna lingvo en la internacia komunikiĝo.

2. Mi aludas nur pri la interpretaj problemoj. Mi spertis multfoje en internaciaj konferencoj, ke la interpretisto „dormis", malfruis la traduko, kaj li hastante tradukis nur duonetrione, fine mistradukante li falsigis la oratoran direndaĵon, aŭ la dokumentan tekston...

3. Mi certas, ke la postaj generacioj devos fari gravajn fortostreĉojn por solvi la lingvajn problemojn. Sed momente kaj en la baldaŭa futuro ni ne povas esti optimistoj: bedaŭrinde troe manifestiĝas la grandpotencaj ambicioj en la lingvouzo. Estas spertebla la „lingva imperiismo", kontraŭ kiu la malgrandaj nacioj povas agi nur tre malfacile. Esperanto kiel neŭtrala lingvo, povus esti efika rimedo por lukti kontraŭ la imperiismaj strebadoj.

D-ro Tibor Bartha, Kalviana episkopo, parlamentaro, membro de la Prezidia Konsilio

1. Mi estas konvinkita, ke la celo de Esperanto-movado estas unu el la plej aktualaj kaj urĝaj taskoj. La latina lingvo plenumis preskaŭ la saman rolon, sed ĝi estis malfacile ellernebla por la simpla popolo.

La evoluo tiom proksimigis la popolojn kaj kontinentojn unu al la alia, ke en la homaro plifortiĝis la konscio pri la unueco kaj komuna sorto. Pri tiu komuneco ni povus longe vicigi negativajn pruvojn: jen la monda ekonomia krizo, aŭ en eventuala nuklea katastrofo kune pereus la tuta homaro. Sed en nia epoko ĝuste pro tio manifestiĝas per elementaj fortoj kaj fortiĝas la deziro, ke la popoloj kunvivu pace, en reciproka estimo kaj frata kunlaboro sur ĉiuj kampoj de la vivo.

La travivo kaj praktiko de tiu konscio pri unueco kaj komuna sorto maleblas sen transponti la malfacilaĵojn kaŭzitajn de la lingva malsameco. Esperanto kiel helplingvo – sen difekti la naciajn lingvojn – povus plenumi tiun rolon.

2. La Monda Komunika Jaro proponas eminentajn eblojn por la monda Esperanto-movado plie fokusigi la mondan interesiĝon al ĝiaj celoj, por aktivigi ĝiajn adeptojn. Mi konas la kampanjon, kiu disvolviĝis kadre de la Ligo de Nacioj komence de la 20aj jaroj por oficiale rekonigi Esperanton. Mi opinias, ke tiu historia ekzemplo influos ankaŭ al UN, posteulo de la Ligo.

3. La komplikajn lingvajn malfacilaĵojn de la internacia komunikado eblos solvi nur akceptante la proponojn de la internacia Esperanto-movado. La membroŝtatoj de UN devus interkonsenti tutmonde pri deviga instruado de la internacia lingvo en la lernejoj. Tiutempe la decidproponon de la Ligo subtenis 14 ŝtatoj, en 1966 estis transdonita al la ĝenerala sekretario de UN memorando en la nomo de 72 milionoj da homoj el 74 landoj. Mi estas konvinkita, ke tiasenca propono havus hodiaŭ multe pli grandan subtenon. Sed ja estus iluzio esperi rapidajn sukcesojn. Esperanto-movado devas ankoraŭ longe kaj persiste lukti por unu el la bazaj kondiĉoj de la interhoma frateco, unueco, reciproka konfido kaj paco: por la akcepto de la internacia helplingvo.

La eklezioj devos tiujn fortostreĉojn en la futuro pli energie subteni, kvankam la religiuloj jam ĝis nun plenumis gravajn taskojn, kies rezulto estas interalie, ke la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) fondiĝis en 1941. La Ligo kongresas ĉiujare lige kun UK, do la sekvan fojon en Hungario. Mi esperas, ke kaj UK kaj KELI-Kongreso havos pozitivan reeĥon ĉe la eklezioj en Hungario.

Imre *Szenes*

György Radó

ESTI HUNGARO

Esti hungaro – tion determinas
ne naskiĝloko kaj ne matrikula
lingvo fiksanta, ke vi originas,
vi loĝas kie. Ne! Loknomo nura –,
malgravas, kie estas en la mondo
Losonc[1]*, Szeged, Ujvidék*[2] *aŭ Toronto.*

Esti hungaro – tion determinas
ne ŝtataneco. Ame priatentu,
per vortoj, agoj, sango ĝin defendu,
la landon, kiun por vi viv' destinas;
se fremda gent' vin traktas per honoro,
sen hont' ĝin amu, per hungara koro!

Esti hungaro – tion determinas
ne origino, ja nenie limas
deveno turka[3]*, ugra*[4] *aŭ alia.*
Hungaro – ne nobelo familia.
Se estus purrasuloj de fiero,
hungaroj ne plu restus sur la tero.

Esti hungaro – tion determinas
ne lingvoscio, kvankam surd' deprimas,
sed ankaŭ Liszt[5] *nur per muzik' ne mutis,*
kaj Széchenyi[6] *hungare nur balbutis.*
Latine kiuj luktis por leĝaroj
– ĉu ĝuste ili *estus nehungaroj?*

Esti hungaro – tion determinas
eĉ ne gepatra lingvo. Kapon klinas
ni por Gizel' Beata la Bavara[7]*,*
Anastazia el Kiev'[8] *– hungara*
reĝin'... Kiu kun vi samvola estas,
iĝas hungaro kaj hungaro restas.

Esti hungaro – tion determinas
ne nostalgio. Kvankam kor' inklinas
tristi pro l' dom' gepatra, kantoj, gusto,
amikoj foraj, sed ĉi estas krusto
de la Esenco kerna, tuto kara,
senmanka, estas kies nom': hungara.

Esti hungaro – tion determinas
ne politiko. En kiu sentimas
la forto, devas entrepren. sorton,
fidelon, vivon, ne parti-perforton,
super landlimoj, super historio.
Decidu fine tamen temp' pri tio!

Esti hungaro – tion determinas
ne kultursupereco. Ni estimas
dividi kun ĉiu la bonon, belon,
ni, kiuj vivas en la val' Danuba;
kelkfoje se ni gajnis la superon –
konkuro nobla estis ĝi senduba.

Esti hungaro – tio ne signifas
fermiĝi. Ni kun senc' nur tiam vivas,
se la ekzisto kiel noblan gemon
nin koherigas en la mondan plenon;
la mozaikon nia fal' frakasus,
ni ja pereus, kaj la bild' forpasus.

Esti hungaro – tio ne signifas
faluzi, kun koler' malami time.
Mensogo, ke ni en malbeno vivas
por murdi fratojn sub makul' Kaine.
Ne! Ne plu fidu al ĉi superstiĉo,
se vi sopiras vivi per feliĉo!

La hungarec' ne estas vest' ŝanĝebla.
Se vi iĝis, restos vi hungaro nepra.
Neante ĝin, vin mem vi malkonfesas,
vi fremdas, vivu kvankam en riĉaĵoj.
Fidele al ĝi, eĉ se tra domaĝoj,
ne senpatruje via koro pezas.

Esti hungaro ... neoj, neoj aras!
Sed ĉiu opa ne *al* jes *kunparas!*
Disputo, malo estu eĉ amara,
tamen kunligas nin sintez' hungara:
memoroj, planoj kaj sopiroj, fortoj,
pasintaj, nunaj kaj estontaj sortoj.

Tradukis: Imre Szabó

1. Nun Lučenec en Ĉeĥoslovakio
2. Nun Novi Sad en Jugoslavio
3–4. En la pasinta jarcento, kiam la lingvistoj strebis difini la originon de la hungara lingvo, ekzistis du ĉefaj direktoj: laŭ la unua: nia lingvo estas turk-, laŭ la alia: estas finn-ugra-devena.
5. Ferenc Liszt (1811-86): fama hungara muzikvirtuozo kaj komponisto. Li tute ne parolis hungare, sed li konfesis sin hungaro. Li verkis plurajn hungartemajn komponaĵojn.
6. István Széchenyi, grafo (1791-1860): iniciatinto de la hungara reformmovado, elstara verkisto kaj ŝtatviro; li parolis hungare nur tre malbone.
7. Gizela (ĉ. 973-?): bavardevena edzino de la unua hungara reĝo Sankta Stefano.
8. Filino de la Kieva Regnestro Jaroslavo la Saĝa, edzino de la hungara reĝo Andreo la Unua.

D-ro Csaba Aradi

La stepo HORTOBÁGY — Nacia Parko

Rara birdo de sodaj stepoj
la kolum-glareolo

La nomo de Hortobágy (hortobadj) estas preskaŭ ĉiam menciata, kiam ie ajn en la mondo oni parolas pri Hungarlando. Esploristoj kaj artistoj, turistoj kaj ĉasistoj faris konata tiun stepan pejzaĝon, sed multaj jam aŭdis ankaŭ pri la tiea aparte interesa nacia parko – cetere la unua en la lando.

Eminentaj poetoj kaj verkistoj ofte klopodis arte priskribi la ne facile esprimeblajn naturbelecojn de tiu impone belega pejzaĝo, kies kvazaŭ tabla ebeno liberigas la rigardon ĝis la senfina malproksimo. La praa infinito malserene premas la koron se meze oni ĉirkaŭrigardas; oni sentas pormomente angoron, sed ĝi baldaŭ solviĝas pro revaj inspiroj de la admirinda naturo.

Koloroj – valoroj de la stepa pejzaĝo, kuriozaĵoj de flaŭro kaj faŭno, specifaj nuancoj de folkloro kaj historia kulturo, ankoraŭ vivaj tradicioj de la paŝtistoj – ĉiuj ĉi, karakterizaj eroj de la eksterordinara Hortobágy, igas ĝin nepre protektinda kaj vizitinda naturtrezoro.

Praa arbaro iĝis stepo

Eble surprizas la arkeologia-geografia fakto, ke pratempe la tuta regiono de Hortobágy estis arbara, kie ankaŭ marĉoj, foje boskoplenaj herbejoj trovis lokon. Tian pejzaĝon oni kutime nomas *arbareca stepo,* kaj ververe tiel aspektis iam granda parto de la Hungarlanda Ebenaĵo, teritorio oriente de Danubo ĝis la Transilvaniaj montaroj. La praa, natura pejzaĝo tamen plene ŝanĝiĝis dum jarmiloj pro la homa agado.

Hortobágy estis loĝata jam ekde la malfrua ŝtonepoko, sed pri la metalepoko jam pli da trovaĵoj atestas. Ĝis nun estas la plej karakterizaj surteraj formacioj de Hortobágy la tumuloj – hungare: *kunhalom* – (teramasoj super tomboj), kiuj restis el la epoko, kiam migrantaj gentoj alportis tien siajn Aziajn kredo-kutimojn.

La nomadaj paŝtantaj popoloj, poste ankaŭ la alvenintaj hungaroj forbruligis la vastajn arbarojn por akiri novajn paŝtejojn, kiujn bezonis la kreskantaj gregoj. Tiel komenciĝis la disvastiĝo de la stepo, tiu historia transformiĝo de la regiono, kiu kontinue daŭris dum la jarcentoj. La 18a jc. vidis eĉ pli akcele malkreski la arbarojn pro la intensiĝanta agrokulturo. La pliiĝanta bestobredado sur la kampoj, poste la reguligo de la akvoj surmetis la kronon: la arbaroj definitive likvidiĝis. Ĉiuj homaj intervenoj rapidigis la procedon al la grunda sodiĝo, kiu siavice malebligis la abundan kreskon de la vegetalaro.

Dum la pasinta jarcento estis regulita la rivero *Tisza,* kune kun la alfluoj, kaj sekve de tiu agado, la regiono de Hortobágy pli kaj pli elsekiĝis. Poste ĝi estis utiligebla sole per paŝtado. La tutan stepon plenigis egaj gregoj de ŝafoj, bovoj kaj ĉevaloj, sed somere, ĉar dum vintro ĝi preskaŭ malpleniĝis: la paŝtistoj pelis la bestojn al proksimaj vilaĝoj kaj al arbara zono apud urbo *Debrecen.*

La riĉa bestaro de la stepo tiutempe jam iĝis fama – precipe ĉe ĉasistoj – pro la grandioza, apenaŭ ĝenita kaj loĝata ampleksa spaco (kie troviĝas ankaŭ marĉetoj kaj bosketoj). Ĝi prezentas vere vastajn eblojn por multaj bestoj. Post mezo de la 19a jarcento la akcela industriigo transformis la pejzaĝojn de Eŭropo. Ĉie likvidiĝis la marĉoj, estis plugitaj la ĝis tiam naturaj kampoj, la intensa agrokulturo preskaŭ nenie lasis virga la naturon. Des pli reliefiĝis la nemultaj lokoj, kie ĝi ankoraŭ restis en relativa abundo. Tial Hortobágy iĝis azilo, kien rifuĝis la vivuloj el aliaj elsekigitaj marĉoj de la Ebenaĵo.

Fine de la pasinta jarcento jam multaj emfazis la bezonon ŝirmi la naturan staton de Hortobágy, gardi ĝin por venontaj generacioj. Kaj hungaroj, kaj eksterlandanoj konsideris tion grava devo, ĉar kiel la verkisto Zsigmond *Móricz* esprimis: „...pli eksterordinara spektaklo nenie troviĝas en la lando." Ke ĝi estas vere eksterordinara – ne nur en Hungario – tion aprobis ankaŭ UNESKO, deklarante „biosfero-rezervejo" la teritorion de Nacia Parko Hortobágy, 53 mil hektarojn.

En marĉejoj loĝas la akvokan-birdo



Bruna ibiso, rara nestanto en inundejaj arbaretoj

Naturprotektado kaj mastrumado samloke

Protektadon de la stepo devas garantii la kontinua paŝtado, la eksterstala bredado. Samkiel la paŝtado iam forte kontribuis al establiĝo de la etherbaj paŝtejoj, tiel ankaŭ ĝia daŭra kontribuo estas gravega por konservi kaj ŝirmi ilin. Kvankam oni faras tion ege malofte, en Hortobágy oni nepre devas paralele kaj kune mastrumi kaj protekti la naturon.

La vivularo de marĉoj en Hortobágy

Blankfloraj nimfeoj kaj junkoj, kano kaj skirpo ekzistas ankoraŭ kiel restaĵoj de la praa, ofte inundita Hortobágy. Ilian admirindan mondon plej abunde prezentas la marĉo de *Kunkápolnás*.

Ĉe akvoj, en kiuj abunde vegetas ŝvebantaj kaj naĝantaj fukoj, amaso da algoj, jam de malproksime aŭdeblas la bruaj kolonioj de ridmevoj, blankvangaj kaj nigraj ŝternoj, diversspecaj vaneloj kaj fulikoj. Flosantaj nestoj de la merĝantaj nigrakolaj kaj grizvangaj gregoj ŝvebas apud kolonioj de arĝentaj pluvioj kaj etaj kalidroj.

Ene de la densaj kanejoj troviĝas kaŝitaj kolonioj de purpurardeoj, platbekaj plataleoj kaj kap-plumtufaj grandaj ardeoj (egretaj). Mirinde rava montras sin tiu vivareo. Inter la abunda vegetaĵo volonte nestas maloftaj vadbirdoj, la botaŭro kriegas, fiŝas la griza ansero kaj fulme atakas la bruna marĉa cirkuo, tiu specio de akcipitroj.

Tamen la plej vigla vivo estas videbla printempe kaj aŭtune, kiam la birdoj ekmigras. Centmiloj da birdoj ŝanĝas sin ĉiutage por iom ripozi sur la stepo, sur la marĉetoj, kaj poste daŭrigas la flugadon malproksimen, al foraj celoj.

La marĉojn ĉirkaŭantaj kampoj estas nur printempe kaj aŭtune superakvumitaj, sed ilia ege varia vegetalaro prezentas al pluraj, jam pereemaj birdospecioj favorajn eblecojn tie nesti kaj vegeti. Nenie alie en la lando, nur tie ĉi vivas la strikapa akvokanbirdo, la pigmea porzano kaj la blankflugila ŝterno.

Ŝternidoj en flosanta nesto

Sodaj stepoj

La zono de la marĉaj kampoj preskaŭ nerimarkeble kondukas al la sodaj stepoj. Certe ilia aspekto estas konata kiel la plej karakteriza de Hortobágy; la etherba, malabunda paŝtejo. La ŝanĝiĝantaj koloroj de tiuj herbejoj imprese varias laŭ la sezonoj. La degelintan neĝon sekvas rapida verdiĝo sur la stepo; sed kiam la ruĝtiga festuko ekfloras, la stepo surprenas purpurruĝan koloron, kiun poste la arda somera suno bruligas orflava. La somerfine sekiĝintan kaj tial bruniĝintan stepon la aŭtunaj pluvoj denove vigligas je verdkolora, sed elinter la herbaro jen kaj jen ekblankas kalvaj, sodaj termakuloj. Cetere, ankaŭ ties vivo ne malhavas interesaĵojn.

La abunda insektaro de la seka stepo proponas grandiozan manĝotablon al la nestantaj kaj migrantaj birdoj. En Hungario nur unu birdospeco formiĝis, sed ĝi vivas tie ĉi: la mallongfingra alaŭdo, endogena en Hortobágy. Kie ripozas brutaro, tie emas vivi glareolo, sed ankaŭ aliaj birdoj. Inter ili la „stepa struto", la granda otido ŝatas viziti la stepon, precipe dum pariĝa sezono, eĉ nestas kie konvene ŝirmas ĝin alta herbaro. Dum la aŭtuna migrado eĉ la sekan stepon kovras multloke postpluvaj akvotavoloj, kiuj prezentas al egaj amasoj da birdoj abundan nutraĵon, altirante ilin ripozi. Precipe la sovaĝaj anseroj kaj riverbordaj birdoj meritas atenton pro la variaj specioj kaj grandnombreco.

Blankflugila ŝterno,(Chlidonias leucopterus) loĝanto de portempaj marĉetoj

Stepaj arbaroj

Preter la rivero *Tisza* kaj ĉe rando de la stepo videblas arbaretoj de salikoj, poploj, ankaŭ de tilioj kaj kverkoj. Tre varia vivularo troviĝas en tiuj stepaj kaj sodstepaj arbaretoj, servantaj ankaŭ kiel rifuĝejo por aliloke preskaŭ malaperintaj specoj. La fama „Arbaro malpermesata" (ĉe Ujszentmargita), la kverkejo de Ohát, la „arbaro de ruĝpiedaj falkoj" estas vizitataj de multaj naturamantoj, kiuj plezure ĝuas ankaŭ la florplenajn sodajn kampojn kaj la arbar-stepon etendiĝantajn apud la grandiozaj kverkoj. La inundejojn karakterizas la ardeoj, la miksaj kolonioj de noktardeo, eta agretardeo kaj ralardeo. En la kverkejoj tranoktas blankvostaj maragloj.

Rare nestas la grizvanga grebo



Praaj brutospecioj

Sur la sodaj stepoj eĉ hodiaŭ vivas la praaj specoj, kiuj dum jarcentoj elformis la paŝtejojn, tiujn sur kiuj pro la moderna agrokulturo ili jam preskaŭ likvidiĝis. Tamen antaŭ la lasta minuto la pereadon ni haltigis. La plej famaj el inter tiuj specoj estas la hungara griza bovo kaj la tord-korna ŝafo „racka". Ilin protekti oni devas plenumi enkadre de la protektado de la tuta stepo, de la Nacia Parko.

La naturajn trezorojn de la regiono kvazaŭ traplektas la vivaj tradicioj de la paŝtado, de la paŝtistoj. La artaĵoj de la loĝantoj prezentas vivan folkloron, multe da ĉarme karakterizaj specifaĵoj. Riĉaj kaj abundaj estas la multflankaj trezoroj en la Nacia Parko Hortobágy.

Tradukis: E. *Fenyvesi*

Gaje en Budapeŝto

Budapeŝto, la gastama urbo, akceptis denove kelkcent diversnaciajn adeptojn de la Internacia Lingvo.

Ankaŭ ĉi-jare abundis en Budapeŝto la gastoj el Pollando. Mi plezure vidis la ĉarmajn polinojn, kiuj memorigis min pri la iama kanzono, aŭdita de mia avino: „Polino unuigas la ĉarmojn de ĉiu dam'" (Mia hasta traduko el la hungara). Sed mi renkontis ankaŭ gastojn el Sovetio, Italio, Bulgario, FR Germanio, Ĉeĥoslovakio, Francio, Hispanio kaj eĉ el Turkio. Sed li ne estis esperantisto. Tamen eble la renkonto kun li estis por mi la plej ekscita el ĉiuj. Sed mi devas paroli pri



Inter esperantistoj renkontis la jaron 1983 s-ro Ilhan Uygur, direktoro de la komputista sekcio de Internacia Telekomunikada Unuiĝo ĉe UN

ĉio laŭvice. La tempo de VEF ĉi-kaze koincidis kun la aranĝaĵo de Komputoscienca Societo Johano Neumann, Interkomputo-82. La laborlingvo de



Profesoro Helmar Frank el Paderborn jam aliĝis al la 68-a UK

tiu internaciskale grandsignifa simpozio estis Esperanto, kaj la partoprenintoj postlabore venis al la Silvestra Balo de VEF. Tiel aperis ĉi tie sinjoro *Ilhan Uygur,* kiu direktas la komputistan sekcion de la Internacia Telekomunikada Unuiĝo ĉe UN. Dum Interkomputo li havis aparte interesan sperton. „Mi absolute ne konjektis, ke multe da homoj parolos tiom flue Esperanton, kaj alvenintoj el diversaj landoj tiel interkomunikas. Mi devas diri, ke mi estas tre surprizita" – li konstatis. Same surprizita estis lia babilpartnero, sinjoro *Antono Alonso Nunez* el Hispanio, profesoro pri matematiko, kiu proksimume tridek jarojn parolas Esperanton. Profesoron Nunez kaj lian edzinon surprizis Budapeŝto. „Estas tro da mirindaĵoj – ili diris. – La du flankoj: en la unua Pest (prononcu: peŝt – noto de la redaktoro), en la alia Buda. La unua estas impona, la alia mirinda. La Parlamento, la interno de la Preĝejo Matiaso estas nekredeble belaj."

Budapeŝto estas bela, jes ja, sed kiom da personoj volos vidi ĝin ĉisomere, dum la 68-a UK. Ĉu la turismaj interesaĵoj de nia ĉefurbo kaj la aliaj avantaĝoj sufiĉos por allogi ĉi



Rikardo Ŝulco el FRG trovas Hungarion „vere sociala lando"

tien la esperantistojn el la tuta mondo en la nuna iom malfacila ekonomia situacio?

Mi volis havi imagon pri la futuro, ĝuste tial mi sondis la opiniojn de la partoprenantaro. Sinjoro *Hermann Tautorat* el FR Germanio siaflanke diris: „Mi ne povas imagi, ke la partoprenantaro estos sub du mil, kaj ne povas imagi, ke ĝi estos pli ol kvar mil." Alia gasto el FRG, sinjorino *Helga Windisch* diris: „La hungaraj kutimoj tre plaĉas al ni, kaj ankaŭ la

eblo renkonti aliajn esperantistojn." Ŝi eĉ aldonis: „Hungaraj homoj estas tre ĝentilaj." Tiu lasta aserto iom surprizis min, ĉar mi ne ĉiam spertas tion. Tamen, sinjorino *Martina Woite*, el la sama lando simile opiniis. „Ege bonan sperton mi havis, ĉar ĉiam mi tre ĝojas,

Valentina Stefanova el Bulgario ankaŭ fartis bone

se mi estas kune kun esperantistoj preskaŭ el la tuta mondo." Al la demando, ĉu ŝi venos al UK, ŝi respondis: „Mi bedaŭras, ke mi ne havos ferion por partopreni en la 68-a UK, kaj ankaŭ miaj gefiloj ne havos ĝin. Do ni devos resti hejme. Sed el la Federacia Respubliko venos multaj. Ekzemple nia grupo el Darmstadt partoprenos kun pluraj esperantistoj. Mi eĉ varbos por tio." Profesoro *d-ro Helmar G. Frank* el Paderborn jam eĉ aliĝis al la Budapeŝta UK. La fama literaturisto, *Rikardo Ŝulco* kontraŭe, ne aliĝis, kaj timas veni, dirante: „Mi iomete timas la tro grandan kvanton (Ba! – la raportisto). Ne forgesu, ke mi estas 76-jarulo kaj mi timas la tro streĉan vojaĝon kaj la homamasojn. Ĉiukaze multege ekplaĉis al mi Hungario, miaj impresoj estas tre agrablaj. Mi havas la impreson, ke mi vivas en vere sociala lando. Speciale la trafikiloj estas tre favorprezaj." Tiu opinio de sinjoro Ŝulco koincidis kun la aserto de sinjoro *Terry Watts* el Britio. Jen liaj vortoj: „Mi ne planas partopreni en la UK, sed mi pensas, ke homoj venos ĉi tien amase kaj el Oriento kaj el Okcidento, eĉ se mi ne venos. Mi estas tute certa pri tio, ĉar via lando prezentas multajn avantaĝojn por eksterlanda turisto, se li venas el Okcidento. Efektive la prezoj de multaj aferoj en via lando estas malaltaj. Mi povas citi cigaredojn, bieron, manĝaĵojn en restoracioj. Kaj kiam turisto venas el alia lando, li juĝas la kostojn de ferio multe pli laŭ elspezoj lokaj ol laŭ la elspezoj, kiujn li devis fari antaŭe en sia propra lando."

Post tiuj ideoj ekonomikecaj, mi turnis min al ĉarmulinoj. Mi elserĉis la plej ĉarmajn, kaj trovis, ke ili nek prognozis pri la partoprenantaro, nek cerbumis pri elspezoj. Ili unuanime diris: se ekzistos unu sola eblo, nepre ili venos al Budapeŝto. Iliaj nomoj: *Ewa Kwiatkowska, Renata Kazmierczak, Lucyna Grzobrowska, Barbara Rokicka* (ĉiuj el Pollando, „ĉar polino unuigas..." ktp.) Sed tiel same opiniis *Valentina Stefanova* el Bulgario, *Eva Péter* el Hungario. „Ĉu oni trovos tiujn ĉi belajn nomojn en la Kongresa Libro de la 68-a UK de Esperanto?" – mi demandis min, kaj tiam mi renkontis viron aŭtoritatan, kies nomo troveblas almenaŭ en la Jarlibro de UEA. Temas pri sinjoro *Fabrizio Pennachietti* el

S-ro F. Pennachietti el Torino: „Mi ŝatas Hungarion."

kelkaj monatoj fartos same agrable en la gastama Budapeŝto ne kelkaj cen-

Ewa Kwiatkowska el Pollando. Dum la UK oni povos renkonti ŝin – probable motivo sufiĉa por aliĝo **(Fotoj de Zsolt Csata)**

Torino, Italio. „Mi ŝatas Hungarion kaj mi sentas grandan interligon kun hungaroj pro historiaj kaj pro personaj kaŭzoj" – aŭdeblas liaj vortoj el la magnetofono. Estas tre agrable por hungaraj oreloj aŭdi tiajn dirojn. Kaj estas agrable antaŭvidi, ke nur post

toj, sed pluraj miloj da esperantistoj, kaj ili kunportos ne malpli agrablajn impresojn por havi poste la plej agrablajn rememorojn pri la hungara ĉefurbo... *Agrablan* restadon en Budapeŝto por ĉiuj estontaj kongresanoj!

P.A. *Rados*

INTERKOMPUTO 1982

INTERKOMPUTO
BUDAPEST 1982

1983 estas Internacia Jaro de Komunikado. Multaj komputistoj kune renkontis ĝin en Budapeŝto, enkadre de Internacia Komputoscienca Simpozio kaj Ekspozicio INTERKOMPUTO '82. La arangon partoprenis pli ol ducent fakuloj el 19 landoj, inter ili el Usono kaj Jordanio.

La simpozio – kies sola laborlingvo estis Esperanto – malfermiĝis per plenkunsido, dum kiu prelegis eminentaj sciencistoj, inter ili prof. d-ro Grigorij *Cejtin* (SU), prof. d-ro Helmar *Frank* (FRG), prof. d-ro Ottó *Haszpra* (H). Poste komenciĝis la sekcikunsidoj, 4-5 paralele, kiuj daŭris tri tagojn. Dum la simpozio en 10 laŭtemaj sekcioj estis prezentitaj 103 prelegoj el 16 landoj. La simpozio finiĝis per plenkunsido, dum kiu la sekci-prezidantoj prilaksis la laboron de siaj sekcioj.

Sukcesan fonon donis al la simpozio la komputoteknika ekspozicio, funkcianta en la konferencejo mem, kun partopreno de pli ol dudek firmaoj. Estas notinde, ke Esperanto estis la *sola* lingvo ankaŭ de la ekspozicio – ĉiuj informaj surskriboj de la ekspoziciaĵoj estis esperantlingvaj. Sendispute la plej interesa parto de la ekspozicio estis la rekta kontakto kun la komputilo de Universitato Michigan (Usono). Multaj partoprenantoj provis la plej malmultekostan hungaran komputilon, kiu estis la ĉefpremio de dum-interkomputa Esperanto-rilatanta konkurso pri programado por mezlernejanoj.

Post la aranĝaĵo multaj partoprenantoj estis petataj esprimi siajn opiniojn. Kelkaj el la respondoj: estas mirige, ke jam antaŭ la simpozio aperis la sesvoluma, ĉ. 1200 paĝojn ampleksanta konferenc-materialo (kompreneble esperantlingva!), laŭteme enhavanta 93 prelegojn el 16 landoj; same ĝustatempe aperis mikroslipo, enhavanta la perkomputile redaktitan parton de prelegoj; belaspekta estas la poŝtkarto, aperanta pri INTERKOMPUTO '82; la serioza, 40-paĝa programkajero precize enhavis ĉion pri la simpozio kaj ekspozicio; la televid- kaj radio-elsendoj, gazetara kampanjo efike funkciis.

La Komputoscienca Societo «Johano Neumann», organizanto de INTERKOMPUTO '82 ricevis multajn gratulojn de diverslandaj komputistoj. Jam komenciĝis la prepar-laboroj de nova, laŭteme iom pli larĝa arangŏ: konferenco pri komunikado, kiu okazos ĉijare en aŭgusto en Budapeŝto enkadre de Universala Kongreso.

D-ro Péter *Broczkó*

La plej malmultekosta hungara mikrokomputilo (ĝi kostas ĉ. 500 dolarojn) altiris la atenton de multaj vizitantoj (Foto de Tamás Broczkó)



Gustumu la hungaran!

La hungara lingvo apartenas al la finno-ugra lingvofamilio kune kun la lingvoj manjŝi (vogula), ĥanti (ostjaka), komi (zirjana), udmurta (votjaka), mari (ĉeremisa), mordva, finna, estona, lapona k.c. (en ordo de proksimeco al la hungara). La popoloj, parolantaj tiujn lingvojn – krom la hungara, finna kaj lapona – vivas en Sovetunio.

Ni komencu la konatiĝon kun la hungara per iom da fonetiko kaj la skribo.

Akcento

La akcento estas ĉiam **sur la unua silabo.**

Alfabeto

La hungara skribo uzas modifitan latinan alfabeton, konsistantan el 40 literoj. /En krampoj ( ) ni donas fonetikan transskribon, baziĝantan sur la E-a alfabeto, sed uzantan ankaŭ specialajn signojn por sonoj, ne ekzistantaj en E-o. Longecon de vokalo ni signas en la transskribo per dupunkto (:) post la vokalo; longecon de konsonanto per ĝia duobligo./

1. a (ɔ). Mallonga labiala /t.e. artikulata ankaŭ per la lipoj/ *o* kaj *a,* iom simila al E-a *a* antaŭ *ŭ* /*a*ŭto, *pa*ŭzo/. Prononcu unue *aŭ* kaj poste provu forlasi *ŭ.* La hungara **a** (o) tre similas al angla *o* en h*o*t.

Vorto, konsistanta el tiu ĉi vokalo:

a (ɔ) 'la' /difina artikolo, senakcenta/.

2. á (a:) Longa *a,* kiel en E-aj k*a*to, v*a*zo.

Vorto:

á (a:) – interjekcio kun proksimuma signifo 'ne pensu', 'tute ne'.

3. b (b) kiel en E-o.

Vortoj el la ĝisnunaj literoj:

baba (bɔbɔ – kursivo: akcentata vokalo) 'pupo'; en la ĉiutaga lingvo ankaŭ 'infaneto', ‚bebo'

a baba (ɔ bɔbɔ) 'la pupo/bebo'

báb (ba:b) 'marioneto, pupo'

4. c (c) kiel en E-o.

5. cs (ĉ) kiel E-a *ĉ.*

ács (a:ĉ) 'ĉarpentisto'

Csaba (ĉɔbɔ) virnomo.

6. d (d) kiel en E-o.

ad (ɔd) '/li/ŝi/ĝi/ donas'

a baba ad (ɔ bɔbɔ ɔd) 'la infaneto donas'

7. dz (dz) kiel en E-a e*dz*o.

8. dzs (ĝ) kiel en E-aj naĝi, manĝi.

9. e (e). Mallonga malfermita (vasta) *e,* proksimume kiel en E-a s*e*ndi. /Propre du diversaj sonoj – unu vasta kaj unu mezvasta –, sed ĉe parto de la parolantoj, precipe urbanoj, jam apenaŭ diferencigataj./

be (be) 'internen'

de (de) 'sed'.

10. é (e'). Longa fermita (malvasta) *e;* pli fermita ol E-a *e* en b*e*la.

ebéd /*e*be:d) 'tagmanĝo'.

Atentu pri tio, ke en la hungara la longeco de vokalo ne dependas de la akcento. En la vorto *ebéd* la unua vokalo *e* estas mallonga, sed akcentata; la dua vokalo *é* estas longa, sed senakcenta.

11. f (f) kiel en E-o.

fa (fɔ) 'arbo, ligno'.

12. g (g) kiel en E-o.

ág (a'g) 'branĉo'

ága (*a*:gɔ) 'ĝia branĉo'

a fa ága (ɔ fɔ *a*:gɔ) 'la branĉo de la arbo'

ég (e:g) I. 'ĉielo'

ég (e:g) II. '/li/ŝi/ĝi/ brulas'

a fa ég (ɔ fɔ *e*:g) 'la arbo/ligno brulas'

ég a fa ága (*e*:g ɔ fɔ *a*:gɔ) 'brulas la branĉo de la arbo'.

13. gy (d'). Mola /palatala/ *d (d+j* prononcataj kune/, proksimume kiel en angla *d*ew, franca *d*ieu, rusaj *d*elo, Na*dj*a; serbo-kroata *dj,* ĉeña, slovaka *ď.*

agy (ɔd') 'cerbo'

ágy (a:d') 'lito'

ágya (*a*:d'ɔ) 'lia/ŝia/ĝia lito'

a baba ágya (ɔ bɔbɔ *a*:d'ɔ) 'la lito de la pupo/bebo'

egy (ed'd') 'unu', ankaŭ nedifina artikolo

egy ágy 1. kun akcento sur *egy* (*e*d'd' a:d') 'unu lito'; 2. kun akcento sur *ágy* (ed'd' *a*:d') '/iu/ lito'.

14. h (h) kiel en E-o; sed vortfine ofte muta.

hab (hɔb) 'ŝaŭmo'

cseh (ĉe) 'Ĉeño, ĉeña'

Cseh (ĉe) familinomo

hagy (hɔd') '/li/ŝi/ĝi/ lasas'

hegy (hed') 'monto'.

15. i (i). Mallonga *i,* kiel en E-a v*i*ntro.

cica (*ci*cɔ) 'katido'

csacsi (ĉɔĉi) 'azenido'

fia (*fi*ɔ) 'lia/ŝia filo'

a fáig (a *fa*:ig) 'ĝis la arbo'

16. í (i:). Longa *i,* kiel en E-a v*i*ro.

híd (hi:d) 'ponto'

így (i:d') '/ĉi/ tiel'.

17. j (j) kiel en E-o.

jaj (jɔj) interjekcio 've'

fáj (fa:j) '/ĝi/ doloras'

fej (fej) I 'kapo'

fej (fej) II. '/li/ŝi/ melkas'

feje (feje) 'lia/ŝia/ĝia kapo'

a baba feje (ɔ bɔbɔ feje) 'la kapo de la pupo/bebo'

jég (je:g) 'glacio'

haj (hɔj) 'har/ar/o'

haja (hɔjɔ) 'lia/ŝia/ĝia hararo, liaj/ŝiaj/ĝiaj haroj'

18. k (k) kiel en E-o.

babák (bɔba:k) 'pupoj, beboj'

fák (fa:k) 'arboj'

ágak (*a*:gɔk) 'branĉoj'

ki? (ki) 'kiu? ' (persono)

ki fia? (k*i* fiɔ) 'kies filo? '

kik? (kik) 'kiuj? ' (personoj)

kefe (k*e*fe) 'broso'.

(Daŭrigota) I. *Botos*



Departemento Tolna

Kiu volas konatiĝi kun la karakterizaj Transdanubiaj pejzaĝoj de Hungario, tiu vizitu departementon Tolna, en kiu vere alternas la diversaj naturaj belaĵoj de la regiono kaj la turistoj povas ĝui abunde la multkoloran vizaĝon de la pejzaĝo en ĉiuj sezonoj de la jaro. La departemento egale meritas la atenton de la naturamikaj turistoj kaj tiun de la folkloristoj. Antaŭ kelkaj jardekoj ĝi apartenis al la t.n. „blankaj makuloj" de la Hungarlanda fremdultrafika mapo, sed nuntempe ĉiam pliiĝas la interesiĝo, kaj al la centra urbo de la departemento, kaj al la naturaj belaĵoj de la pejzaĝo.

La administra centro de la departemento *Szekszárd* (seksard) estas unu el la plej etaj el inter la tiaspecaj urboj de Hungario, havanta nur 23 000 loĝantojn. Origine la urbo situis sur la bordo de Danubo, sed sekve de la riverreguligo ĝi fariĝis pli fora disde la riverego. La historio de la urbo komenciĝis en la romia epoko, dum la turka regado ĝi preskaŭ tute detruiĝis kaj nur en la dekoka jarcento ĝi fariĝis denove loĝata urbo. En la Muzeo „Balogh Ádám" precipe la arkeologiaj kaj folkloraj kolektaĵoj meritas la atenton de la vizitantoj.

Szekszárd kaj ĝia ĉirkaŭaĵo estas menciinde fama pri la vinproduktado. Ĝia specialaĵo estas la vaste konata ruĝa „taŭrosango", sed krome oni produktas plurajn aliajn vinspecojn.

La plej interesa vidindaĵo de la departemento estas la rezervejo de sovaĝbestoj *Gemenc,* situanta sur 50 000 hektaroj apud Danubo. Ĝi estas la plej valora bestprotekta teritorio de Hungario, kies cervoj estas konataj ĉie en Eŭropo. La ĉasistdomoj, kaŝiĝantaj en la interno de la arbaroj ofte akceptas gastojn. Kiuj serĉas specialan, originalan, naturan akvomondon, tiuj trovas ĝin tie. En la arbaroj alternas akvoj, kanaroj kaj senarbejoj. La arbaroj estas riĉaj je herboj kaj de printempo ĝis aŭtuno ili estas laŭtaj de la kantado de diversaj birdoj.

Sude de Szekszárd situas la alia speciala teritorio de la departemento. Tiu estas *Sárköz* (ŝarkez), etnografia kolonio, konsistanta el kvar vilaĝoj. El ili la plej granda estas *Decs* (deĉ), kiu kreis daŭran valoron en ĉiuj branĉoj de la popolartoj. Tie funkcias la Popolarta Hejmindustria Kooperativo, en kiu laboras ĉ. 600 virinoj, pluraj el ili ricevintaj la distingan titolon „Majstro de la Popolarto". Krom iliaj brodaĵoj estas tre interesa ankaŭ la nuntempe kutima popolkostumo, kiun oni portas precipe dum la festotagoj. Ankaŭ la memoraĵoj de la antikva popol-arkitekturo estas troveblaj sur la stratoj de la vilaĝo. De jaro al jaro oni aranĝas tie la „tagojn de Sárköz".

Dombóvár, la plej juna urbo de la departemento kaj tiu de Hungario, havanta 17 000 loĝantojn, situas en la sudokcidenta angulo de la departemento. Ĝi estas grava fervoja centro. Dum la dua mondmilito ĉi tie restadis Zoltán Kodály, la konata hungara komponisto.

La memordomo „Ferenc Liszt" en Szekszárd

Vintro en la rezervejo Gemenc

Glacia „arkitekturo"

Paks (pakŝ) estas la plej vigla urbeto de la regiono, ĝi havas konsiderindan pasinton historian, kiel trairejo inter Transdanubio kaj la Granda Ebenaĵo. En tiu ĉi urbo nun estas konstruata la unua atomcentralo de Hungario.

Dunaföldvár (dunafeldvar) simile, estas grava trairejo trans la Danubo, kun daŭre funkciantaj fervoja- kaj ŝosea pontoj, kiuj estigas kontakton inter ambaŭ bordoj de Danubo. La vilaĝo havis gravan rolon dum la pasintaj historiaj epokoj, el tiuj tempoj abundas eĉ nun interesaj arkitekturaj artmemoraĵoj.

Tamási (tamaŝi) kvankam havas nur 8000 loĝantojn, tamen ĝi havas miljaran pasinton. Sude apud la vilaĝo situas la alia, grava rezervejo en la departemento, apartenanta al la vilaĝo Gyulaj (djulaj). Tie oni bredas specialan cervojn, havantajn tre grandan kornaron. Pro tio la arbaro Gyulaj estas ŝatata ĉastereno de eksterlandaj ĉasistoj.

Ozora kaj *Simontornya* (ŝimontornja), mezgrandaj vilaĝoj situas ĉe la norda limo de la departemento, apud la kanalo *Sió* (ŝio), kiu kunligas Balatonon kun Danubo. Ambaŭ vilaĝoj havas riĉan historian pasinton kaj gardas plurajn memoraĵojn el la forpasintaj epokoj.

Bonyhád (bonjhad) havas longan historian pasintecon, ĝi ekzistis jam dum la romia epoko. Dum la turka regado la urbeto preskaŭ tute senpopoliĝis kaj nur fine de la dekoka jarcento la vivo reaperis en ĝi. La urbo abundas je diversaj arkitekturaj memoraĵoj, precipe ĝiaj preĝejoj atestas pri la antikvaj tempoj.

El Esperanta vidpunkto la departemento ankaŭ apartenas al la „blankaj makuloj" kaj ĝi havas prefere pasinton, ol estanton. Paŭlo *Lengyel* (Lendjel) estis unu el inter la iniciatintoj en Hungario, kiu disvastigis Esperanton. Li vivis kelkajn jarojn en Szekszárd kaj fondis tie etan presejon. En 1897 leginte anoncon pri la unua Esperanta lernolibro, li tuj mendis el ĝi plurajn ekzemplerojn, kaj komencis sian agadon por Esperanto. Poste li surprenis la presigon de la revuo Lingvo Internacia kaj de 1904 daŭrigis tiun sian agadon en Parizo. Pro la eksplodo de la unua mondmilito oni internigis lin, post kvinjara suferado li revenis en Hungarion kaj en Budapeŝto li fariĝis korektisto de presejo. Lia literatura agado konservis sian valoron ĝis hodiaŭ.

Nuntempe en Dombóvár, Tamási, Paks kaj Simontornya funkcias Esperanto-grupoj kaj oni instruas la lingvon en kelkaj vilaĝaj bazlernejoj.

István *László*

Simontornya: restaĵoj de fortikaĵo el la 13-a jarcento



Vivanta popolarto en Decs

Ĉapitroj el la historio de la internacilingva movado

D-ro Árpád Rátkai

7. INTER RIFOJ DE MILITO KAJ PACO

La Pariza Universala Kongreso de Esperanto, komenciĝonta la 2-an de aŭgusto 1914 estis decidonta pri starigo de internacia organizaĵo de la landaj neŭtralaj societoj. Ankaŭ la laboristaj esperantistoj en Parizo intencis starigi similan internacian organizaĵon. En Luksemburgo oni preparis la unuan kongreson de la idistoj. Ŝajnis, ke la tutmonda internacilingva movado kreos siajn internaciajn organizaĵojn, kaj la jaro 1914 estos nova mejloŝtono en la movadhistorio, post kiu komenciĝos ia nova periodo kun nova impeto... Tamen, ne tiel okazis. Eĉ ne unu el la planitaj tri kongresoj okazis, kelkaj kongresanoj fariĝis civilkaptitoj, internigitoj: tiuj, kiuj jam atingis Francion, sed estis ŝtatanoj de „malamika lando". Eksplodis la unua mondmilito.

La detruoj de la milito

La internacilingva movado troviĝis en tute speciala situacio: *dum kelkaj tagoj preskaŭ tute ĉesis tiuj internaciigaj tendencoj, kiuj pli frue estis la premisoj de la estiĝo kaj prospero de la movado.* En la militantaj landoj oni enkondukis cenzuron. Oni limigis la lingvojn de la korespondado, kaj kelklande Esperanto ne estis inter la permesataj. Pluraj poŝtkomunikoj estis interrompitaj, pluraj funkciis neregule, amaso da sendaĵoj simple perdiĝis. La sendado de presaĵoj estis pli malfacila ol antaŭe, por ne paroli pri la altiĝo de la tarifoj. Kelkaj Esperanto-revuoj estis malpermesitaj, ekz. la revuo de UEA en Francio.

Landlimojn oni fermis, ĉe aliaj severiĝis la kontrolo. Soldatservo aŭ konstanta malboniĝo de la vivkondiĉoj eĉ en la neŭtralaj landoj kaŭzis *rapidan malkreskon de la movado,* disfalon de multaj grupoj. Preskaŭ tute ĉesis la Esperanta libroeldonado, fermis sian Esperanto-fakon i.a. la firmao Hachette en 1916. Granda plimulto de la Esperanto-revuoj ĉesis. Ĉesis la agado de la Akademio de Esperanto kaj aliaj internaciaj institucioj.

Mortintoj de la internacilingva movado dum la unua mondmilito (1914 08 01 – 1918 11 11) estis Zamenhof mem, Emile Boirac, prezidanto de la lingvaj institucioj, Harold Bolingbrooke Mudie, prezidanto de UEA kaj prezidanto de la Brita Esperanto-Asocio, Théophile Rousseau, vicprezidanto de UEA, Louis Couturat, fakta gvidanto de la Ido-movado – por mencii nur la plej elstarajn. Granda parto de la aktivuloj falis sur diversaj batalkampoj, aliaj troviĝis inter la *militkaptitoj.* La membraron de la diversaj asocioj diligente konsumis la milito. Ekzemple la 7233 membroj de UEA en 1914 restis nur 1958 en 1918. Kaj UEA estis inter la organizaĵoj pli bonsortaj...



La eŭropa milito.

Germanaj oficialaj raportoj Esperantigitaj.

Berlin, 22. Februaro.

Oficiale. — En Masuren la persekutado post la vintra batalo estas finita. Dum la purigado de la arbaroj nordokcidente de Grodno kaj en la bataletoj ĉe la Bobr kaj Narew, pri kiuj ni raportis dum la lastaj tagoj, ĝis nun estis kaptataj: 1 komandanto-generalo, 2 divizio-komandantoj, 4 aliaj generaloj kaj proksimume 40 000 soldatoj; 75 kanonoj, ĝis nun ne jam konstatebla nombro da maŝinpafiloj kaj multe da alia pormilita materialo. La suma kaptaĵo el la vintra batalo en Masuren do estas ĝis hodiaŭ

7 generaloj, pli ol 100 000 soldatoj, pli ol 150 kanonoj

kaj eĉ ne proksimume jam taksebla pormilita materialo de ĉia speco, inter ĝi maŝinpafiloj. Kelkfoje la kontraŭulo enterigis aŭ mergis en la lagojn municion kaj pezajn kanonojn. Ekzemple hieraŭ apud Lötzen kaj en la Widminnen-lago ni elterigis aŭ malmergis 8 pezajn kanonojn.

La 10 an rusan armeon de generalo barono Sievers post tio oni povas rigardi esti tute pereigita.

Internaciismo kaj naciisma influo

Malgraŭ la skizitaj cirkonstancoj *UEA funkciigis sian malgrandiĝantan delegitan reton:* disvolvis vastan helpagadon al la militviktimoj. Estante politike neŭtrala organizaĵo en neŭtrala lando, ĝi povis reprezenti en tiuj jaroj la praktikan internacian solidarecon, kunlaborante kun la *Internacia Ruĝa Kruco.*

Tamen, post la militeksplodo definitive montriĝis, ke multajn esperantistojn forte influas la *naciismo.* Precipe *en Germanio kaj Francio* multaj el ili senrezerve apogis sian imperiisman registaron, kaj tiu fenomeno kondukis al la *uzo de Esperanto por militpropagandaj celoj.* Tiu agado – kvankam sendube ĝi konstribuis al plia riĉiĝo de la lingvo – *estis tute kontraŭa al la fundamenta celo de la movado.* Krom tio, baldaŭ montriĝis ĝia malutilo ankaŭ el pure pragmatisma vidpunkto. Ja la naciisma ondo pasis, sekvis ĝin granda seniluziiĝo pri la milito. Altiri amasojn en tiu atmosfero povis nur pacifismaj kaj revoluciaj sociaj movadoj. Ĉirkaŭ la jaro 1916 la internacilingva movado atingis la kulminon de sia malprogreso.

Sed temis pri lingvo kaj movado penetrinta en preskaŭ cent landojn kaj en preskaŭ ĉiujn sferojn de la homa kulturo, kaj ĝi havis adeptojn en ĉiuj sociaj tavoloj. La movado jam sen-

dependiĝis de la faktoroj, kiuj kreis ĝin, ĝi *havis sian propran, internan dinamismon.* Ĝi estis ne nur rezulto de la internaciigaj tendencoj, sed ankaŭ faktoro, kiu stimulas la internaciiĝon. Tial la malprogreso de la internacilingva movado en la jaro 1916 haltis, kaj malgraŭ la malfavoraj konsekvencoj de la pliakriĝanta milito dum la sekvaj unu-du jaroj montriĝis nova ekdisvastiĝo.

Impeta disvolviĝo

Tute nova fenomeno estis la rapida disvastiĝo de la lingvo en la militkaptitejoj. En preskaŭ ĉiu granda militkaptitejo ekfunkciis Esperanto-rondo, kaj ili organizis kursojn. En la jaroj 1917–1918 pluraj miloj da esperantistaj militkaptitoj agadis tie, kaj post ilia hejmeniro daŭris ilia aktiveco. Militfine la etoso fariĝis pli favora.

ESPERANTO
DUM LA MILITO

1917

DUA JARA RAPORTO
DE
UNIVERSALA ESPERANTO ASOCIO

CENTRA OFICEJO:
10. RUE DE LA BOURSE, GENÈVE (SVISLANDO)

Fortaj pacifismaj, kontraŭmilitismaj kaj laboristaj movadoj, revolucia ondo kaj naskiĝo de demokratiaj reĝimoj en pluraj landoj estis faktoroj, kiuj entute forte superis la negativan efikon de la malfavora ekonomia situacio postmilita.

En 1918–1923 la neŭtralaj landaj asocioj reorganiziĝis, ilia membrarsumo kreskis de unu-du mil ĝis 18 mil. UEA denove ekfloris kun rapide kreskanta membronombro: la komenca 1958 en 1918 atingis la rekordon de 9424 en 1915. Post unujara refalo la membraro denove estis iom pli ol 9000 en la jaroj 1917–1930. Apud tiu tradicia, neŭtrala alo ankaŭ la laborista esperantista movado atingis tiun grandecon ĝis la fino de la jardeko.

Pri la nombro de la esperantistoj en la intermilita periodo cirkulis la plej diversaj ekscesaj taksoj. Sed nur unu ciferon ni povas konsideri ne senbaza, ne subjektiva, eĉ se nur kun rezervoj ni povas akcepti ĝin. *Johannes Dietterle,* direktoro de la Esperanto-Instituto por la Germana Regno, entreprenis la preskaŭ senesperan taskon: iel denombri, kiom da esperantistoj estis en la mondo en 1926? Sube ni resumas lian rezulton.

En la jaro 1926 entute 126 565 esperantistoj vivis en la mondo. Ili vivis diaspore, *en pli ol 7000 lokoj, en 108 landoj.* La supereco de *Eŭropo* estas evidenta: 109 713, t.e. 86,6 procentoj de la esperantistoj estis eŭropanoj.

La laŭlanda dividiĝo ne estis proporcia al la nombro de la loĝantaro. La ĝenerala kulturnivelo influis plej forte tiun dividiĝon. *Duono de la esperantistoj troviĝis en nuraj kvin landoj: Germanio, Ĉeĥoslovakio, Britio, Aŭstrio kaj Japanio.* Plua kvarono troviĝis en pluaj ses landoj: Nederlando, Sovetio, Italio, Francio, Usono, Polio; kaj la lasta kvarono en 97 aliaj landoj!

Plagoj en paca periodo

La intermilita politika situacio – malgraŭ la paco – tamen baldaŭ montriĝis fundamente malfavora por la internacilingva movado. Kaj ne la 1929–1933-a monda ekonomia krizo estis la plej danĝera – kvankam en si mem ĝi estis katastrofo. Malgraŭ la deziro de la amasoj havi demokratian pacon, la imperiisman militon sekvis


Internacia Bulteno

Germana informilo pri la milito

1a Kolekto
(Novembro 1914 — Oktobro 1915)

ESPERANTO
EL LA KOLEKTO DE
FAJSZI KÁROLY
GYÜJTEMÉNYÉBŐL
BUDAPEST

Eldonita de
Deutscher Esperanto-Dienst
(Germana Esperanto-Servo)
Berlin S 59

Verlag (Eldonejo): Friedrich Ellersiek, Berlin S 59

imperiisma paco-sistemo, kiu jam preparis la novan mondmiliton. Denove *naciisma ondo* inundis multajn landojn, pli forte ol antaŭ la milito. Ekz. en Orienta-Eŭropo – de Suomio ĝis Grekio – ĉiu ŝtato malamike rilatis al siaj najbaroj. *Faŝismaj tendencoj leviĝis, ekspluatante kaj fortigante la naciismon.* Ŝanceliĝis kaj falis demokratiaj reĝimoj en pluraj landoj. La konkeroj de la faŝismo kulminis dum la dua mondmilito.

La movado baldaŭ perdis la komencan elanon. La membrar-sumoj de la neŭtralaj landaj asocioj jam en 1923 ekstagnis: dum dekkvin jaroj ĝi restis 18-19 mil. UEA jam frue spertis financan krizon. La rekordnombraj internaciaj kongresoj en Nurenbergo (1923) kaj en Vieno (1924) havis rekordajn deficitojn. Aldoniĝis organiza krizo, la senĉesaj tiurilataj diskutoj konsumis la energiojn. Malantaŭ la diversaj problemoj, diskutoj kaŝiĝis la ideologia krizo de la movado. Furiozis la diskutoj pri la „interna ideo de Esperanto". Ĉe kelkaj asocioj aperis naciisma influo, kaj ili „de dekstre" atakis la negativan neŭtralismon de UEA.

La kontraŭhumanisma, kulturdetruanta *faŝismo estis malamiko de la movado* ne nur ideologie. La faŝismo landon post lando likvidis la laboristan esperantistan movadon, kaj baldaŭ ĝi komencis fari la samon kontraŭ la neŭtrala alo.

Mihály Gergely

En krizo de komunikado

La konoj de homoj, organiziĝintaj je komunumoj, plimultiĝis laŭgrade. Niaj prauloj antaŭ multaj jarmiloj renkontis unue la ĉirkaŭantajn *materialojn* kaj uzis tiujn por nutri kaj vesti sin, por formi loĝejojn; poste ili transformis la materialojn en ilojn: laborilojn kaj armilojn. Post paso de la tempoj, en la 17-19-aj jarcentoj la homo ekregis la *energion,* kvankam li sciis ankaŭ pri ĝi same malmulte kiel liaj prauloj pri la materialoj. Unue la filo de la 20-a jarcento perceptis ĉirkaŭ si la amasiĝintajn kaj danĝere rapide akumuliĝintajn *informojn,* kaj li, elkoninta sian novan, ne malhaveblan vivmedion, ekuzis ĝin por sia propra prospero, kreante tiel la rimedojn, kadrojn kaj teorion, pli kaj pli memstaran sciencon de la informado, komunikiĝo.

Ĉiuj ĉi niaj tri vivkondiĉoj hodiaŭ estas en krizo. Ja evidentiĝis, ke ni rajtas, kiel ĝis nun, facilanime disipi nek la materialojn, nek la energion, ĉar ili dum antaŭvidebla tempo elĉerpiĝos, kaj fariĝis certa ankaŭ, ke ne nur evolui, sed eĉ ekzisti ni ne povos sen la necesaj konoj, scioj. La formiĝintaj kadroj, naciaj kaj internaciaj strukturoj apenaŭ kapablas harmoniigi la teoriajn kaj praktikajn metodojn, mekanikiĝintajn, foruzitajn, rustiĝintajn mekanismojn kun la informfluo, kun novajn principojn inspirantaj, novajn modelojn postulantaj tendencoj de nia epoko. Ili ne povas solvi la akumuliĝintajn kontraŭdirojn, ili ne povas ekregi la novajn fortojn, kiuj serĉas novajn vojojn eĉ, se tio rezultigos krevon, skuojn, eksplodon.

Evidentiĝis la simptomoj de la kontraŭdiroj, fenomenoj, paralizantaj la pluan evoluon. La sciencan vivon, la laboron de sciencistoj kaj esplorinstitutoj, la senprokrastan diskonigon kaj aplikadon de la novaj rezultoj, malkovroj malhelpas, retenas de tago al tago pli okulfrape – krom aliaj streĉiĝoj – la neprilaborebla amaso de informoj, la malmoderniĝo de la periloj aŭ la malsufiĉo de la novaj komunikiloj, sed ĉefe kelkaj bazaj kontraŭdiroj de la komunikado. La informo, materialo pri la naskiĝanta *nova* ne alvenas kun la necesa rapideco al la aplikantaj lokoj. La nesolviteco de la lingva komunikado pluroble superakumulas la suspektojn, antaŭjuĝojn inter la popoloj kaj landogrupoj. Pro simplaj lingvaj malkomprenoj, miskomprenoj plimultiĝas la privataj tragedioj kaj amaskatastrofoj, postulantaj mortojn. Plimulto de la naskiĝantaj sciencaj rezultoj neaplikite malvalidiĝas en la forŝtormantaj jaroj de ĉiam pli mallonga periodo de uzebleco. La doktoroj, hospitaloj kuracas sub la nivelo de ebloj de nia epoko, pro tio milionoj suferas plu kaj mortas pli frue ol necese. En dekoj da landoj, konkerintaj sian sendependecon en la pasintaj jardekoj, miliardo da homoj povas pli malrapide revivigi, krei siajn naciajn kulturon, lingvon. La direkton de informiĝo, pensado de la tie vivantaj civitanoj difinas la grandaj komunikaj informcentroj, laborantaj per la lingvo kaj en la posedo de la iamaj koloniigantoj. La malekvilibro ĉi tie estas tiom maljusta, ke 80 procentoj de la tagaj informoj devenas de tiaj agentejoj, kaj en la angla lingvo ili disradiiĝas en la mondon. Kaj ili povas influi la politikan starpunkton, ĉiutagan amuziĝon, guston, kulturan vivon de la loĝantaro ne nur de la Tria Mondo en la subevoluintaj mondopartoj, sed ankaŭ de la meze, eĉ pleje evoluintaj landoj.

Sur la nuna nivelo de scienco, tekniko kaj agrikulturo, la homaro jam hodiaŭ povus certigi,

ke ĉiu loĝanto de la Terglobo povu labori, manĝi, trinki, loĝi, lerni inde al homo, aŭ alivorte povu en difinite mallonga tempo (eĉ ene de du-tri jardekoj) nuligi la mizeron, senlaborecon, la vivkonsuman malsaton de centmilionoj, la analfabetismon;

ke ĉesu la ruinigo de la natura medio, kiu vivtenas, nutras nin ĉiujn, kaj minace kuras al la fina neniiĝo, ke ni certe evitu la baldaŭan biologian malekvilibriĝon sur la Tero, la venenigon de humo, riveroj, maroj kaj aero, la agonion de la biologia sfero;

ke estu unu fojon por ĉiam ekster konsidero la militoj, ĉiam maltaŭgaj por alporti justan solvon; ke estu nuligitaj la arsenalo de termonukleaj kaj tradiciaj armiloj, ĉar la landoj povos ankaŭ sen ili – eĉ: nur sen ili! – aranĝi siajn konfliktajn aferojn;

kaj fine, ke estu solvita la komunikada, lingva demando, dum la jardekoj pli kaj pli deprima, ke la 157 membroŝtatoj de UN interkonsentu por akcepti, devige enkonduki iun peran lingvon.

Tiu ĉi supra estas eĉ ne kompleksa listo de la sortodemandoj, kiuj alportas al la triono-duono de 4,5 miliardoj da homoj sur la Tero maldignan, bestan vegetadon, mizeron, korpajn-animajn suferojn; kaŭzas ĉiujare malsatmorton de pli ol dek milionoj da infanoj kaj plenkreskuloj, eviteblajn malsanojn, fruan morton de multcent milionoj; kaj trudas al la tuta homaro timegon pro atommilito, minacanta nian ekziston per Apokalipsa mondpereo, pro la milita apliko de la termonukleaj armiloj, el kiuj por ĉiu opa homo estas destinita averaĝe „porcio", kiu egalas al 3,5 tunoj da tradiciaj eksplodaĵoj, pro la nereturnebla polucio de la natura medio.

La popoloj, vivantaj en la epoko de sciencaj-teknikaj-sociaj revolucioj, postulas plenrajte, ke la gvidorganoj, direktantaj la ŝtatojn kaj internaciajn organizojn, instituciojn kaj posedantaj la necesajn, reale ekzistantajn sciencajn kaj teknikajn eblojn, ekagu konscie kun morala respondeco por minimumigi, nuligi la minacojn, kiuj timigas la mondon en pli kaj pli multaj sferoj per krizoj, per fina pereo.

Por ĉio ĉi estus bezonataj nur iom pli da saĝo, konscienco, apreco, helpemo, mondnivela funkciigo de la prudenta menso kaj logiko.

Ĉu eblas atendi, ke tiu miraklo baldaŭ realiĝos? Ĉu eblas esperi, ke en nia kronikita historio la ĝisnunajn pli ol 15 mil militojn ne sekvos la plej granda, la plej lasta: la termonuklea sinmortigo?

Por fari tolerebla la ĵusan, eĉ ne senmankan inventaron pri niaj sortoproblemoj, por trovi kondiĉojn, akcepteblajn por ĉiu, depost la dua mondmilito senĉese daŭras traktadoj inter la ŝtatestroj kaj en pli ol 3000 internaciaj organizoj. Kun tre malgrandaj, senesperigaj rezultoj.

La sorton de la homaro ĉiam en nekompreneble malgranda mezuro direktis la saĝa, bonvola prudento, la kristana aŭ humanisma helpemo, oferemo: do, ni ne flegu iluziojn, ties brila tago aŭroros baldaŭ. Do ni devas daŭrigi la laboron, komencitan por moderigi la nunan krizon. Ankaŭ por la demokratia kaj reale ebla solvo de la lingva demando.

* *

Plimulto de la studoj, ĉiutagaj publikaĵoj pri la komunikiĝo traktas la demandon unuavice kiel temon pri la perado, interŝanĝo, aplikado de la informoj el la rondo de la sciencoj, duavice kiel problemon de la aŭdvida informperado. Kvankam nun kaj ankoraŭ longe havas kaj havos la saman – se ne pli grandan – gravecon la voĉa kaj skriba *lingvo-rimedo,* eblo de la *personaj kontaktoj, respektive informiĝo.*

Ni legas, aŭdas multfoje, ke la sciencaj plenumoj ĝis la celo devas lukti kontraŭ kiom da kostaj, malfacilaj baroj; ke la ŝtatviroj, diplomatoj, traktante ĉiutage pri la monda sorto, travivas kiel komikajn, tiklajn situaciojn; ke la nekomprenon, miskomprenon de la teknikaj instrukcioj, de la avizoj pri uzado de konsumartikloj akompanas kiaj tragedioj; sed la mondaj informcentroj preskaŭ ne mencias la ĉiutagajn hontiĝojn, suferojn pro la manko de la peranta lingvo kaze de tiuj centmilionoj, kiuj transpaŝas la landlimojn kun ĉiam pli komprenebla gesto. La amaso de la ĉiujaraj ekvojaĝantoj kreskas nehaltigeble. Ĉiu ŝtato rigardas sia propra, grava intereso vojaĝigi, en hoteloj lokigi, prizorgi kaj amuzi ilin, ja por pli kaj pli multaj landoj la turismo fariĝas riĉa fonto de valutenspezo. Ĉu ne estas absurde kaj ridinde, ke nek la turismaj direktantoj, nek la ŝtataj gvidantoj divenis ĝis nun, ke ili devus pensi ankaŭ pri la lingvaj-komunikaj bezonoj de multcentmilionoj da samtempuloj, kaj ili devus pri tio kiel eble plej baldaŭ trakti kaj difini reciproke akcepteblan, demokratian percepton?

* *

Pri la *kielo* la respondo de la koncernuloj kaj lingvistoj estos baldaŭ same ridinda, kiel la ago de la postrestinta, neglektema kuracisto, kiu preskribas kontraŭ ĉiuj malsanoj ekskluzive aspirinon kaj laksigilon. Alivorte: ni lernu lingvojn! – jen la eksmodiĝinta, pruvite maltaŭga recepto.

Kiel refuton ni povus longe vicigi la ripetiĝantajn kaj la pli novajn el la ĉiutagaj novaĵoj. Nur kelkajn por rekonsciiĝi. Ĉu ne estas timiga fakto, ke en la epoko de sciencaj-teknikaj-sociaj revolucioj el 4,5 miliardoj da homoj estas 800 milionoj analfabetaj, do ĉiu kvar-kvina homo ne scias skribi kaj legi? Kaj spite al tiom da ebloj por lerni, spite al tiom da instigo, tiu ĉi nombro ne malgrandiĝas, sed kreskas. Eĉ en tiaj landoj, kia estas Usono.

Fremdaj lingvoj estas instruataj en plimulto de la landoj semajne en multaj horoj en la lernejoj kaj krome en kursoj, sed la rezulto estas tiom modesta, ke nur kelkaj gelernantoj ellernas unu-du devigitajn fremdajn lingvojn tiom, ke ili scias paroli, skribi kaj legi.

Kaj kiuj ellernis unu-du lingvojn, ankaŭ el ili nur malgranda parto povas tiujn uzi per la facileco kaj sekureco de la gepatra lingvo, kaj povas eviti la malavantaĝajn, hontigajn situaciojn en la parolo kun la koncerna gepatralingvulo. Ankaŭ por la vojaĝanta turisto estas ŝoka tiaspeca travivaĵo, por la politikistoj, sciencistoj traktantaj seriozajn aferojn – io tia estas animskua, respekto-detrua. Kaj ĉiu nia samtempulo havas la rajton, ke tiaj situacioj ne subrangigu nin en dua-triarangajn civitanojn.

* *

Ĉu eblas trovi solvon en tiu antagonisma lingva situacio?

Tiom aras la danĝeroj, kiuj minacas la ekziston de la homaro, ke ni ne povas antaŭvidi kromvican tagordiĝon de la lingva demando. Jam antaŭ la fina, ĉion konsideranta aranĝo povus la gvidantoj de la popoloj interkonsenti pri *provizora, reciproke lojala formo.*

Se mankas tia interkonsento, tiukaze preme, deprime efikas al la lernemuloj la demando: kiun lingvon elekti? Kiom da lingvoj ellerni? Kaj se ili jam ellernis tiele-kiele unu-du-tri lingvojn, la investita, fantaste multa tempo, energio kompensiĝas ne certe, ja eĉ konante unu-du lingvojn oni ofte suferas la menciitajn humiliĝojn, financajn perdojn. *Internacia konsento pri lingvo finfine certigus la instigan motivon, ne malhaveblan por la sukceso de la lingvolernado, nome, ke valoras ellerni bone unu-du fremdajn lingvojn, ĉar per ili ni povas ĉie en la mondo kiel samranguloj paroli kun ĉiu homo kaj ni povas ĉie sen obstakloj ĉerpi el la skribitaj informoj.*

La spertoj de la lerneja instruado de du-tri fremdaj lingvoj estas tre malbonaj, kvankam la materialaj ofertoj kaj la fortostreĉoj estas enorme grandaj – sed ankaŭ la malinteresiĝo; nun ni prefere preterlasu ties priskribon. Ĉiu leganto de gazetoj povas kolekti abundan materialon en iu ajn semajno, pri la nekonfesita fiasko de la lingvoinstruado.

Por kuraci la doloran malsanon okazis en la lastaj jarcentoj, kaj ĉefe en la ĵus pasintaj jardekoj nenomberble multaj proponoj. Mi mem proponas la sekvajn:

1. ĝis la fina solvo ekestu internacia decido, laŭ kiu en la evoluintaj kapitalismaj landoj estu instruata kiel unua fremda lingvo la angla, kiel la dua unu *neŭtrala, artefarita lingvo, kiu estas por ĉiu ellernebla facile kaj sur nivelo de la gepatra lingvo.* Ankaŭ laŭ personaj spertoj mi proponas Esperanton por tiu celo;
2. en la socialismaj landoj unualoke estu instruata la rusa, dualoke Esperanto;
3. en la aliaj landoj (laŭplaĉe ĉie) unualoke la rusa, aŭ la angla, sed dualoke ankaŭ tie Esperanto;
4. kaze de tiu lingvoinstrua metodo, se nek la rusa, nek la angla estas uzebla, estus utiligebla Esperanto, kiun ĉiu devige lernas.

La internacia kontrakto, instiga ĉiujn *ellerni nur du lingvojn,* alportus pluajn avantaĝojn (krom la ĝenerala persona sinkompreno):

la loĝantoj de la vastaj anglalingvaj teritorioj, respektive la ruslingvaj civitanoj de Sovetio liberiĝus de la unua devige lernebla fremda lingvo, kaj ili povus anstataŭ ĝi (laŭdezire) elekti iun ajn lingvon, kiun ili bezonas en la laboraj, parencaj, amikaj rilatoj;

la devige ellernebla dua lingvo Esperanto, internacie uzata, ebligus por la skribaj publikaĵoj nekompareble malpli kostan aperigon, pli rapidan disvastiĝon, krome la homaro povus ŝpari tre multe da papero, tempo;

kaj *pri kio ankoraŭ neniu parolis:* Esperanto kaj la *ellerno de la latina alfabeto* aŭtomate kreus perilon inter la nerekoneble malsamaj skribosistemoj de la mondo. Ĝi estus rimedo por la laŭgrada transiro al ĝenerala skribosistemo necesa en la dua kaj tria gradoj, kaj tio estus la plej bona argumento kaze de tiu decido.

Laŭ la decido de Unesko *1983 estas Monda Komunika Jaro,* kaj tio estos la ĉeftemo ankaŭ de la Universala Kongreso somere de 1983 en Budapeŝto.

Ĉu eblas esperi, ke la mondaj forumoj povos interkonsenti pri moderigo de la lingvaj komunikad-problemoj en la hodiaŭa mondo?

Ĉu eblas esperi, ke la grandaj kaj malgrandaj landoj de la mondo povos interkonsenti pri tiu ne pleje grava politika demando?

Ĉu eblas esperi, ke en la komunikada-lingva demando de nia epoko, kies solvo ne ofendas armeajn, geografiajn, ekonomiajn, kulturajn interesojn de iu ajn grandpotenco, almenaŭ nun, en la dudek kvara horo venkos la prudenta menso kaj komprenemo?

„Pannónia" prezentas sin

Por prepari salaton – laŭ malnova sentenco – necesas kvar homoj. Unu avarulo, kiu alversas vinagron, unu malŝparulo, kiu aldonas oleon, unu prudentulo, kiu dozas salon kaj unu stultulo, kiu miksas ĉion ĉi.

Ĉu ankaŭ la recepto kiel akcepti gastojn estas same simpla? Nuntempe jam certe ne: turismo fariĝis grandega industrio, kiun neniel povus funkciigi kvar homoj. La Restoracia kaj Hotela Entrepreno „Pannónia" havas teamon de ses mil personoj, kiu akceptas gastojn el la tuta mondo jam depost jardekoj. Ni laboras por ebligi al Vi agrable ekkoni Hungarion, tiun ĉi malgrandan landon kun granda altirforto.

La turismo, akcepto de fremdlandaj gastoj havas celojn iom similajn al tiuj de Esperanto: ĝi reciproke proksimigas la homojn, helpante al ili ekkoni la mondon kaj unu la alian. El tiu nobla laboro surprenas signifan parton sur la teritorio de la iama romia provinco Panonio – la Entrepreno „Pannónia".

Ni konscias, ke hotelo ne estas celo en si mem, nur rimedo por io, ja neniu ekvojaĝas nur por loĝi kaj manĝi ekster la hejmo. Tamen ne estas egale, kie oni trovas sian liton, kaj en kiu restoracio oni konatiĝas kun la hungara gastronomio?

Alveturante en Hungario ĉu per aviadilo, trajno aŭ aŭtomobilo, jam ĉe la limo Vi renkontas la emblemon de „Pannónia". Vi trovos tiun emblemon en la ĉefurbo, en la ripozejoj de Danubkurbo, en la provincaj grandaj urboj kaj en la feriejoj ĉirkaŭ Balatono. Ni helpas nun al Vi elekti el niaj servoj – decidu Vi mem laŭ viaj vojaĝcelo, preferoj kaj financaj ebloj.

Se Via celo estas Budapeŝto – la urbo kompreneble plej kara por ni – Vin atendas dekoj da niaj domoj. Vi renkontos niajn hotelojn ĉirkaŭ la flughaveno, en la ĉirkaŭurba montaro, kaj ankaŭ en la urbocentro. Permesu, ke ni prezentu al Vi la plej novajn, la plej belajn. Entrepreno „Pannónia" estas membro de tri mondfamaj hotelaj retoj. La hotela reto „Hyatt" – la plej dinamisme evoluanta usona reto – estas kvazaŭ simbolo, kaj tiu nomo estas garantio pri kvalito. La Budapeŝta „Hyatt" prezentas lukson per siaj specialaj servoj kiel Regency Club, hotelo en la hotelo, kaj la arkitekture mirinda atrio. Tiu lukso ne estas por snoboj, sed por personoj, kiuj scias por kio indas elspezi monon.

Certe Vi jam aŭdis ankaŭ la nomon „Novotel", kiu estas prosperanta franca hotela reto. En la urboparto Buda, ĉe la piedo de montoj, tamen je nur kelkminuta distanco de la urbocentro – jen tie staras la Budapeŝta „Novotel". Ĝi kapablas plenumi ĉian postulon, kiun oni starigas por hotelo – kaj tute ne multekoste. Naĝejo, saŭno, solarium, pizzeria, butikoj, bowlingrestoracio – ĉio ĉi eble efikas kiel io ordinara. Tamen, ĉi tie ĉio estas iom alia. Ankaŭ ĉi tie, kiel en ĉiu Novotel, en ajna parto de la mondo, oni trovos refreŝiĝon, amuzon, eblon aĉeti donacojn, kaj ĝui bonan gastronomion – en agrabla familia medio.

„Budapenta" estas membro de okcidentgermana vojaĝoficejo kaj hotela reto. Ĝi estas jam tre populara, kaj tiu fakto fontas el du kaŭzoj: ĝi estas tre facile alirebla el ajna parto de la urbocentro, kaj el ĝiaj fenestroj oni povas vidi admirindan panoramon. Malmultekoste ĝi ofertas komfortajn ĉambrojn kaj delikatajn manĝojn.

En ĉiu sezono kaj en ĉiu loko Vi povas kalkuli pri „Pannónia". Se Vi vizitas Hungarion dum somero, nepre Vi devos bani Vin en Balatono, la plej granda lago de Meza Eŭropo. Sur ĝia suda bordo – kie la sablo estas la plej silke mola – atendas Vin pluraj niaj hoteloj. Dumtage Vi povos ĝui „Windsurf" aŭ sunumadon, vespere la eminentajn hungarajn vinojn kaj pladojn. Se Vi vizitos nin vintre, kaj Vi ŝatas skii aŭ simple nur promeni sur montopinto en freŝa neĝo – tiam serĉu la hotelojn „Silvanus" kaj „Nimród". Se Vi alvenos dum aŭtuno kaj Vi ŝatas ĉasi, nepre Vi eliros al la proksima rezervejo el Hotelo „Gemenc" en Szekszárd.

El niaj legantoj verŝajne multaj partoprenos la 68-an Universalan Kongreson ĉi-somere en Budapeŝto. Jene ni proponas al Vi tuttagan programon. Se post agrabla nokto Vi matenmanĝis en nia hotelo, certe Vi deziras eliri por rigardi la urbon kaj aĉeti suvenirojn. La strato Váci estas la eleganta butikuma strato en Budapeŝto, kiel Kärtnerstrasse en Vieno aŭ Regent street en Londono. Por antaŭtagmeza manĝeto ni povas rekomendi du lokojn: sen perdi tempon, starante oni povas preni iun delikatan manĝeton en „Mézes Mackó", aŭ pli komforte, sidante en la Kafejo „Anna". Kaj kiam alvenas la tempo por tagmanĝo, ĉirkaŭ la unua kaj duono? Ni voĉdonas por la restoracio kaj bierejo „Apostoloj". Ĝi havas jarcentajn tradiciojn, kaj famaj majstroj de la kuirarto preparas ĉi tie la bongustajn pladojn de la hungara kaj eŭropa gastronomio. Dum la posttagmeza promeno estas agrable trinki bonan, fortan Budapeŝtan kafon en la kafejo de „Hyatt". Vespere verŝajne Vi manĝos en la restoracio de Via hotelo. Sed estus granda eraro enlitiĝi tuj. Estos tre agrabla amuzo spekti la programon de la kabaredo „Maxim", kie laste rikoltis sukceson la fratinoj Kessler. Kaj post tio verŝajne volonte Vi trinkus ion kaj dancus iomete laŭ diskreta fortepiana muziko. Ideala loko por tio estas la amuzejo „Casanova Piano".

Jen, mi prezentis nin, transdonante al Vi tiun ĉi iom longan nian vizitkarton. Ni esperas havi la ŝancon ricevi la vian.

(X)

„Katoj kaj ĉevaloj"



La poemoj de Adalberto Huleŝ (1926–) estas konataj por la legantoj de nia revuo: ili ĉiam vekis agrablan impreson ĉe la legantoj per siaj freŝo, originala tono kaj malkliŝa perceptmaniero. Fine de 1982 aperis la unua poemaro de Huleŝ, sub la titolo *Katoj kaj ĉevaloj.* Oni povas mendi tiun ĉi novan produktaĵon de la originala Esperanta poezio ĉe Hungara Esperanto-Asocio. Jen, ĝiaj bibliografiaj indikoj: Adalberto Huleŝ: Katoj kaj ĉevaloj: Originala poemaro. Eldonis Hungara Esperanto-Asocio, Budapest, 1982. 80 p. 21 cm.
ISBN 963 571 100 . Prezo: 12,- gld.

La azeno

Pace vivis mi surkampe
Min per fajna herb' paŝtante
Kaj saltadis en flor-riĉo;
Longe daŭris ĉi feliĉo.

Foje venis mastro fia,
Ŝarĝ' ekpezis sur dors' mia,
Mi ekiris, pasis, pasis,
Ek de tiam ne ripozis.

Venis urb-kolos' renkonte,
Brilis marmorstrat' senkote,
Ĉiu briko tie oris, –
Mia varo ne valoris.

Vilaĝetoj poste vicis,
Nul' da domoj tie riĉis,
Ne allogis tol-silkeco,
Mankis tie eĉ panpeco.

Sekis jam de kvardek jaroj,
Vagis vivaj nur ostaroj,
Sen kompat' mi neglektiĝis,
Moŝt' orgojla konjektiĝis.

Voj' ekmildis, voj' ekkrutis,
Sun' per fajro min surŝutis,
Sin varmeg' al pluvoj ŝanĝis, –
Min la pak' egale ŝarĝis.

Korp' maljunas, forton senas,
Min nur por ridaĵ' mi trenas.
Ĉu ekkuŝi primokote?
Portos ŝarĝon mi ĝismorte.

Marto

Lumo kaj varmo.
Filtriĝas jam la printempo el la ĉielo vapora,
kaj kun la neĝborulo kaj violo
kune sin malfermas la okuloj kaj la koroj.
Abrupte kiom vasta iĝas la mondo!
La esper' prenas ĉe mano la deziron,
kaj kondukas ĝin kiel la patrinoj la etajn infanojn
sur la vojoj, komencantaj sekiĝi.

Antaŭ tempesto

Ĝi venos ekĝeme kaj muĝos venkeme,
hurlante taŭzados la arbojn la vent' –
La trunkoj ekveos, la muroj ektremos,
ploregos l' orkestro de l' nokta prezent'.

Tra vitro ektinta la lampo, la blinda
al spac' sovaĝvoĉa sin strecas je van'...
Vi nur orelumas al bru' viaĉambre
kaj volas, ke fine ekpluvu do jam.

Omaĝe al la memoro de l' animhavaj estaĵoj

Ĝi havis Hundon, havis Katon.
Bovin', Ĉeval', ĉu vi komprenis
aero, akvo, tero, urbo,
al ĝi eĉ dio apartenis

Ĝi havis Hundon, havis Katon –
vanas klopod': ja gust', koloro
nek sala, dolĉa klarigeblas
nek violblua sen esploro.

Hundo kaj kato... Kion diri...
Ni nomis Mondo tiun ĉion.
Orbis – *la* Pictus, *kaj trapulsis*
vivanta sango la foliojn.

Ho, sango ... pulsis ... mondo – vane,
nul, nul, nul mi scipovas diri.
Envenu, virkat-avĉjo; pluvas
. . . . . .

PANORAMO

Turisma bilanco 1982

Ĝis la fino de novembro en la pasinta jaro Hungario akceptis 5,7 milionojn da turistoj el la socialismaj landoj (tiu cifero estis 2,5 milionoj en 1981!), kaj 2,6 milionojn da vizitantoj el kapitalismaj landoj (en 1981 el tiuj landoj venis 2,3 milionoj da personoj). La enspezoj de la hungara turismo estis 176 milionoj da rubloj kaj 241 milionoj da dolaroj. La vojaĝemo de hungaroj ankaŭ moderiĝis: 2,7 milionoj da personoj turistis en socialismaj landoj, kaj 830 mil hungaroj vizitis kapitalismajn landojn. Ĉio ĉi tamen signifas, ke dum la jaro 1982 ĉiu tria hungara civitano vojaĝis al eksterlando, kaj tio ne estas malŝatinda proporcio en la nuna ekonomia situacio. Ĉiukaze, la financa bilanco de la turismo estas pozitiva: Hungario enspezis per turismo valutojn en valoro de 13,7 miliardoj da forintoj, dum hungaraj turistoj elspezis eksterlande nur ĉ. 5 miliardojn da forintoj.

Ekonomia plano por 1983

Dum tiu ĉi jaro hungaroj havas jaron ekonomie tre malfacilan. La jarplano, aprobita de la parlamento, antaŭvidas 0,5–1%-an kreskon de la nacia enspezo, 3,5–3,8%-an kreskon de salajroj, kaj 7,5%-an altiĝon de prezoj. La centra celo de la lando estas – kiel en 1982 – akceli la eksporton kaj konservi la pagkapablon. Dum la pasinta jaro la hungara komerca bilanco montris pozitivan saldon de ĉ. 500 milionoj da dolaroj.

Anglaj gastoj en la hungara Pen Klubo

Francis King, la prezidanto de la angla Pen Klubo vizitis la hungaran Pen Klubon en la fino de oktobro. La gravan personecon de la angla literatura mondo akceptis la estraranoj de la hungara Pen. Poste en amika renkontiĝo kun hungaraj verkistoj, poeto Francis King kaj verkistino Diana Petre parolis pri la hodiaŭa angla teatro kaj prozo kaj informis la gekolegojn pri la laboro de la angla Pen.

Britaj verkistoj en Pen Klubo

Kankano en la Budapeŝta „Moulin Rouge"

Budapeŝto nokte

Kvankam hungaroj ordinare estas homoj kiuj ŝatas pasigi la vesperojn kaj noktojn en la hejmo, ne mankas en Budapeŝto noktaj amuzejoj, malfermantaj siajn pordojn ĉ. la 22-a horo, kaj tenantaj ilin malfermitaj ĝis la 5-a horo matene. La plimulto de tiuj amuzejoj prezentas ankaŭ programojn, en kiuj ĉefrolas kompreneble belaj virinoj... La ĉefaj noktaj amuzejoj tamen havas senfantaziajn imitnomojn, kiel ekzemple «Maxim», «Moulin Rouge» ktp.

PANORAMO

Ĉekoj en Hungario

Komence de la pasinta jaro debutis en Hungario *persona ĉeko,* kiu estas vaste uzata en multaj landoj de la mondo por eviti uzadon de moneroj kaj monbiletoj, kaj tiamaniere simpligi la pagadon. La debuto havis tre modestan rezulton: entute nur 9227 hungaraj civitanoj ekuzis ĉeklibreton. Dum la tuta jaro nur 50 mil ĉekoj estis foruzitaj, kaj eĉ el tiuj ĉ. 35 mil ĉekojn uzis la posedanto ne por pagi, sed por — ricevi kontantan monon! La Nacia Ŝparkaso nun cerbumas: ĉu hungaroj estas tro konservativaj? Aliaj opinias, ke tro konservativa estis ĝuste la Ŝparkaso, kiam ĝi difinis burokratie komplikan garantian sistemon por la civitanoj.

Nokta koncerto

Dum la Silvestra nokto la hungara popensemblo „Hungaria" faris duhoran subĉielan koncerton en Budapeŝto, sur la placo „Blaha Lujza". Malgraŭ la pika malvarmo pluraj centoj da homoj aŭskultis la muzikon de la populara ensemblo.

Sceno el la koncerto de „Hungaria"

La solenaj momentoj de funkciigo: meze staras Lajos Méhes, ministro pri industrio

Atomcentralo startis

La 28-an de decembro 1982 ekliveris kurenton la unua reaktorbloko de la unua hungara atomcentralo, kiu troviĝas en la urbo Paks. Ĝi havas la kapaciton de 440 megaŭatoj: tiu kapacito ĝis 1986 kvarobliĝos. En la nuna momento la tuta kapacito de hungaraj elektrocentraloj estas 4840 megaŭatoj, do la atomcentralo nun liveras 9%, post kvar jaroj ĝi liveros ĉ. 28% de la elektra energio, produktata en Hungario. La publika opinio akceptis la novaĵon kontente, sen ajna timo. Kvankam la hungara gazetaro abunde raportis pri la okcident-eŭropaj movadoj kontraŭ nuklea energio, tiuj raportoj ŝajne restis senefikaj.

La variebla instalaĵo el tuboj estas uzebla por instali magazenojn kaj vendejojn de industriaj varoj.

Ĝiaj varieblaj dimensioj ebligas uzi ĝin por ejoj de ajna grandeco.

La suplementaj instalaĵoj – stabloj por konfekciaĵoj, vendotabloj – agrablìgas aĉetadon kaj vendadon.

Ĉefaj karakterizoj:

- Multe ŝarĝebla
- Ebloj de variado
- Estetikaj konturoj

KERIPAR

„KERIPAR" Entrepreno Produktanta Maŝinojn kaj Instalaĵojn por Komerco

Budapest VI. Népköztársaság u. 43.

Telefono: 313–124 Telekso: 226237

REVUO DE REVUOJ

Nuntempe laŭŝajne svarmas *demandaj frazoj* kiel titoloj en la Ea gazetaro. Eventuale ankaŭ mi konceptus mian komencan frazon ekzemple per „Kial svarmas...? ", tamen mi retenas min, kaj la simptomon prezentas per aserto de la fakto. Sed ni rigardu kelkajn, kompreneble nur se temas pri veraj problemoj. Tuj frapas en HEROLDO (14-15.) iom amara demando de H. *Tonkin:* Ĉu ni mistraktas niajn gvidantojn? Almenaŭ dum UK – laŭ lia publikita detala kongresa taglibro – tio veras, ankaŭ iom amare la leganto povas dedukti tiun bedaŭrindan fakton. Pro organizaj kaj personaj cirkonstancoj estraranoj de UEA, de naciaj asocioj, de aliaj organizoj estas troŝarĝitaj, precipe dum kulminaj periodoj. Klare: necesas pli da aktivuloj, ankaŭ pli da tempo por inici ilin, por kunordigi, por... Eblas daŭrigi plu. Mem Tonkin, sperta kaj lerta organizanto, skizas racie kion mi ne daŭrigis. Pripensindaj aferoj, por pli ekonomie utiligi la elĉerpeblajn fortojn kaj tempon de la gvidantoj. Kiel devigan hejman taskon, mi transdonus tiujn artikolojn al komitatanoj, stabanoj kaj sekretarioj de nia movado. Kaj same la artikolon de Rudolf *Fischer* kiu „aliflanke" traktas iom amaran demandon en E-O AKTUELL (5-6.). De sube. el aktivema vidpunkto de kongresano li lanĉas proponojn por solvi siajn kritikajn demandojn. Mi opinias tre verŝajna, ke post lego de la Tonkinaj artikoloj ankaŭ Fischer modifus kelkajn kritikojn. Sed diskuto necesas, ĝustigo kaj plibonigo pli sukcesas, se spertoj kaj opinioj koincidas. Ni atendas kaj esperas, ke dum la Budapeŝta UK ankaŭ tiuj rezultoj de Antverpeno alportos progreson en preparitaj internaj labordividoj kaj eksteraj, porpublikaj detaloj.

Jam prilingva estas en BUDAPEŜTA INFORMILO (11.) la demando de Bernard *Golden,* kio fakte estas klara respondo. Venis ja sugestoj por fari E-on malpli Eŭropeca, pere de enkonduko de 200 vortoj el Afrikaj, Aziaj k.a. lingvoj. Tiel estus akirebla en oriento pli da favoro... Golden en sia kutima eksplika maniero facile refutas tiun sakostraton, i.a. demonstrante ke nek ia „turk-speranto", nek „ĉinsperanto" igos E-on pli ŝatata en oriento. Samtiel la abundaj latinidaj vortoj de nia vortaro ne helpas E-on inter popoloj kun latinidaj lingvoj...

Kaj ĝuste samtempe legeblas en EL POPOLA ĈINIO (12.) vortoj de fama *ĉina* lingvisto, prof. *Cen Qixiang,* kvazaŭ aŭtentika refuto de la menciita naiva sugesto. Prof. Cen ankaŭ kiel veterana esperantisto emfazas „la sciencecon kaj plejan superecon de la Zamenhofa verko", ĉar ĝi estas „kreita surbaze de komunaĵoj de Eŭropaj lingvoj". Li aldonas: „mi plene kredas ĝian estontecon! " Estas interese legi, kiel li sukcese disvastigis E-on dum sciencaj kunsidoj en Interna Mongolio. Kaj tie en oriento oni ege sopiras je multaj libroj, ne unuavice beletraj! Nia movado posedas mirindan komunikilon por kultivi kulturan interfluon precipe pere de *bezonataj* libroj, ja sciencaj kaj teknikaj montriĝas plej taŭgaj.

Resumo pri iama brila agado de SEU (Sovetresp. E-Unio) fare de D. *Blanke* elstaras en DER ESPERANTIST (3-4.). Ne supraĵa, sed faktoplena, konciza superrigardo memorigas pri tiu multflanka, modela movado. SEU kreskis dum la 20-aj kaj 30-aj jaroj ĝis dek mil membroj, eldonis librojn amase (pli ol 200 titolojn!), ankaŭ gravajn kaj altnivelajn revuojn, kaj fariĝis motoro de la internacia laborista E-movado. Dum la jaroj profundiĝis la krizo de kapitalismo, la faŝismo venkis en Germanio kaj kreskis la militdanĝero kontraŭ la soveta lando. La cirkonstancoj por *internacia* lingvo ege malboniĝis, kaj tiom pligravigis la malfeliĉaj eraroj de Stalin. Per la likvidiĝo de SEU gravaj kulturaj atingaĵoj pereis. Feliĉe ne ĉio.

ARMENA ESPERANTISTO, suplemento de la plurlingve eldonata dumonata „Armenio Hodiaŭ", publikigas salutinde pri Armenia movado kaj tradukojn, i.a. de ĵurnalisto simpatiantan artikolon pri renkontiĝo de gvidantoj de socialismaj E-organizoj. Ne malproksime de Jerevano, en organo de grandtradicia movado, en ISRAELA ESPERANTISTO (sept.) pluraj artikoloj turnas sin al eksterlandaj legantoj por *konvinki* ilin pri la terura militatako kontraŭ Libano. Malvolonte mi tion registras, retenante min de ajna disputo, kvankam instigas kelkaj klare kontraŭdiraj frazoj. Tamen... kiel kompreni tiun promeson de la aŭtoro(!): „kiam niajn celojn ni atingos, la armeo tuj retiriĝos el Libano! "?

Interesaj informoj, parte ege surprizaj, estas legeblaj en DIA REGNO (10-11.) pri la ĝenerale malfavora sinteno de la grandaj religioj, de kristanaj ekleziuloj, rilate al *virinoj. W. Krikke* en tiuj studoj sincere senmaskigas mensogojn, kiuj intencas kaŝi la ofendajn diskriminaciojn fare de plej famaj ekleziuloj. (Ĉe herezuloj plejparte forestis la diskriminacio aplikita de la Roma eklezio.) Tion inverse spegulas ankaŭ la *ekstrema* laŭdo al Maria, patrino de Jesuo, kio cetere nur apenaŭ trovas apogon en Biblio. Tra la jarcentoj ofte ŝanĝiĝis doktrinoj pri Maria; kontraste al la vivaj virinoj (pekaj, kiel Eva), ŝi kiel senpeka estis adorata – kvankam ŝian nomon oni batalkrie uzis por murdi maŭrojn, turkojn, ankaŭ kristanojn. Temis videble pri sentimentala rilato al ideale imagita virino, kies paralelo, la reala ino devis esti kaj obeema edzino, kaj ĉiam kulpigebla kaŭzo de malbonoj...

Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

IMPONA KAPTAĴO EN LA PARADIZA FIŜEJO



La juna fiŝkaptisto kun la grandioza sandro

Tiu ĉi vere ne ĉiutaga afero okazis dum aŭtuno de 1982. Kiom multe da fiŝkaptistoj revas pri tia kaptaĵo! Hokkapti sandron de 7 aŭ 8 kilogramoj! Estus ja eble fieradi – kaj rajte – pri eksterordinara afero, memorinda kaj rakontebla dum la tuta vivo! Tiu ĉi revo realiĝis surprize frue por la juna Stefano *Külley* apud *Agárd* ĉe la *Lago Velencei:* li kaptis sandron de 8350 gramoj (longo 83 cm, perimetro 48 cm, daŭro de lacigo 15 minutoj), tiuloke eksterordinaran predon. La famo rapide diskuris, kaj kiam en la kluboj de fiŝkaptistoj oni traserĉadis la kronikojn por trovi similajn kaptaĵojn, unue tio ŝajnis vana. Plurajn jarojn oni devis trafoliumi ĝis io simila troviĝis registrita.

Kiam ni pridemandis la junan – nur 17 jaran – fiŝhokiston, kiu estas cetere konstruindustria mezlernejano, li modeste parolis pri allogoj de la naturo, de la akvo, kiuj altiras lin al hokado. „La Lago Velencei ravas min ĉiam per siaj karesaj naturbelaĵoj – klarigis Stefano sian inklinon. – Kiel aspektis iam la lago, tion mi ne povis persone sperti pro mia junaĝo. Tamen mi bone vidas jam, ke la preskaŭ kadukiĝinta lago de jaro al jaro rejuniĝas pli kaj pli. Ankaŭ mi spertas la multflankajn kaj interesajn agadojn kiuj disvolvas ĝian ĉarman, novan aspekton."

Subjektiva aserto, tamen ĝi estas pravigebla. Dum du jardekoj sinsekvaj intervenoj, bone pripensitaj, profunde ŝanĝis la vivon de la lago, precipe rilate la kvaliton de la akvo. Ekzistas multaj lagoj sur la Tero, kiuj iĝis kadukaj – kaj ankaŭ la Lago Velencei maljuniĝis jam. Mem la naturo trudis al la homo lian neeviteblan, sanigan intervenon en la vivon de la lago. La ŝlimo ege akumuliĝis kaj la fermentado en ĝi malfavore efikis.

La rejunigon de la malsaniĝinta lago preparis konscienca esploro kaj ekzamenado. Sur tiuj baziĝis la komplekse planita disponaro. Estas jam sufiĉe da malagrablaj spertoj pri medioprotektadoj, izole pripensitaj, zorgantaj sole pri detalaferoj, neglektante la laŭĉenan interrilaton de la kaŭzoj kaj ĝiaj efikoj. Tiaspeca medioprotekto ne taŭgas, eĉ male, ĝi ofte malutilas. Laŭ internacia rekono la projekto pri la disvolvo de Lago Velencei prezentas bonan ekzemplon, kiel indas kunigi ideojn por vere kompleksa agado favore al la naturo, kaj atingi longedaŭrajn efektojn.

La intervenon urĝigis inter aliaj la kreskantaj bezonoj de ripozado kaj sportado. Tiucele la Lago Velencei, kiel la dua lago de Hungarlando, estas ege necesa. La rava beleco de la pejzaĝo, la eminenta konsisto de la akvo, ankaŭ ties saniga efiko, la fajna sablo, la agrabla klimato igas ĝin eminenta loko de la publiko. Aldonu ankaŭ la vastan akvosurfacon, ege konvenan por multaj akvaj sportoj, la ekskurs-eblecojn kun bela panoramo, la tie troveblajn historiajn kaj literaturajn tradiciojn kaj ne laste la proksimecon de la ĉefurbo – jen la faktoroj, akcele ampleksigintaj la intereson pri tiu lago.

Ni menciis jam la tre agrablan klimaton: la temperaturo ĉe la plaĝoj somere ne pli altas ol 22-26 C gradoj. La granita bloko – 352 m alta – sur la norda bordo forte varmiĝas pro la sunradioj (ĉ. 2000 horojn sunradias en jaroj) konvene al sia nomo (Varmamonto). La tiel varmiĝintan aeron la ĝenerale nordokcidenta vento blovas super la lago al la banejlokoj. La lago profundas ĉirkaŭ 2 metrojn, sed interne de la kanejoj troviĝas ankaŭ 3–3,5 metraj profundaĵoj.

La kemia konsisto de la laga akvo igas ĝin sanige efika, precipe ĉe haŭtmalsanoj, krome ankaŭ kontraŭ patologia trograsiĝo, podagro, klimaksaĵoj kaj aliaj kronikaj, virinaj inflamoj. Nervojn trankviliga efekto devenas de la abundaj magnezio-jonoj en la laga akvo. La ŝlimo de la lago – plejparte fajnega sablo – estas taŭga por ŝlimbanado kaj ŝlimpakado. Banejkuracistoj rekomendas banadon en la lago kiel komplementan terapion okaze de korpa kaj mensa elĉerpiteco, anemio, perturboj de metabolo kaj movfunkcioj.

Mirindaj faŭno kaj flaŭro troviĝas en la lago, precipe en la fore kaŝiĝantaj kanejoj. La suda flanko – 420 hektara areo – estas ŝtate protektata teritorio pro originala birdaro. Por igi senĝena ilian ĉasteritorion, la najbara Kan-lago, ankaŭ ties 600 hektaroj estas oficiale protektataj. En tiu birdomondo troviĝas ankaŭ domo por esploristoj: diverslandaj ornitologoj kaj biologoj observas de tie la vivon de la pratipa laga-marĉa tereno, de la vasta kanejo.

Kompreneble meritas gravan atenton la vivuloj ene de la akvo, ja la lago prezentas sin elstare al la fiŝkaptistoj. La Asocio de Fiŝhokistoj direktas la restarigon al la originala stato. Abunde naĝas en la lago eminentaj karpospecoj, ankaŭ ezokoj, bramoj, vegetalon-manĝaj fiŝoj el Orient-Azio (amuroj), krome praaj specioj. Unuvorte, troviĝas vera paradizo por fiŝhokistoj!

Kaj tiun paradizon bone aprecas la hokistoj, inter ili la loka fiŝhokista klubo, kies pli ol kvincent membroj el la laga ĉirkaŭaĵo diligente agas por rejunigi la Lagon Velencei. Tiu klubo edukis jam dum 6 jaroj la junan Stefanon Külley, kies hokistaj kapabloj multe ŝuldiĝas al la kluba prizorgado. Specialaj trejnaj tendaroj ebligis al li kaj aliaj junaj hokistoj akiri altgradajn spertojn kaj sportajn konojn. Liaj pluraj sukcesoj dum konkursoj, ankaŭ la jam menciita, impone granda kaptaĵo pruvas, ke la klubo elektas bone inter la plej lertaj junuloj, kiuj



Antaŭ konkurso sur la Lago Velencei (en la fono vasta kanejo)

siavice laŭ brava sportula maniero strebadas por la kolektivo de la kaptistoj, favore al la afero de la lago.

La junuloj de la klubo, ankaŭ Stefano, rakontis kiel okazas la trejnado de la novaj membroj. Per projekciado de filmoj pri naturprotektado kaj fiŝbredado, per ŝipekskursa prezento de la tuta lago kaj pere de diverstemaj prelegoj la novuloj ekkonas la internan vivon kaj vivularon de la lago. La klubanoj sisteme observas la movadon de la fiŝoj, la eventualajn fiŝpereojn, kiujn oni tuj raportas al la koncernaj instancoj, zorgas pri la establaĵoj de la fiŝhokado, ankaŭ pri pureco de certaj lagopartoj, por nur kelkajn agadojn mencii. Videblas, ke la loka fiŝhokistaro konscie kaj fervore gardas kaj protektas la lagon kaj ties enhavon. Ne mirinde, ka la rejuniĝanta lago multe plezurigas la vizitantojn, la sportulojn, kaj ne laste, prezentas abunde da bongustaj fiŝoj al siaj fidelaj fiŝkaptistoj.

Parto de fiŝhokista bazo ĉe Agárd

Verkis: Ferenc *László*
Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

D-ro Ferenc László

„PROTENVITA” — ekspozicio pri medioprotekto

Per instrumentoj estas mezurata poluciograd o



La last-aŭtuna Internacia Foiro de Budapeŝto havis ankaŭ tre interesan ekspozicion, kiu laŭte postulis la ĉiuflankan protektadon de nia vivo tera. La stumpitaj latinaj vortoj en la nomo de la ekspozicio eble ne tute klare aludis al tiu ĉi postulo, sed la abundaj prezentaĵoj tre forte reliefigis la danĝerojn, kiuj minacas la vivgravajn trezorojn de nia Tero. La vizitantoj forlasis la salonojn kun profundaj impresoj kaj kun la konscio, ke la homaro jam nepre devas efikplene ekagi, kaj en tio *ĉiu ajn* devas siavice partopreni: kaj dommastrinoj, kaj funkciuloj, entreprenoj, esplorinstitutoj same, kiel ŝtataj instancoj aŭ lernejoj. Gardi la vivon de la naturo estas ja en ĉies intereso!

La ekspoziciitaj bildoj kaj grafikaĵoj konvinke montris la interrilatojn en la naturo, la damaĝojn de la partoj de nia medio. La ekspoziciaĵoj efikis kvazaŭ impresigaj „krisignoj”! Nepre necese! Ĉar nuntempe jam tutmonde oni devas lukti kontraŭ mediaj nocoj. La danĝero, kiu ĉie ajn aperis sekve de la eksploda disvolvo de la tekniko, estas ege serioza realo, ververe ebla kaj rimarkebla aro da danĝeroj.

Antaŭ nur kelkaj jardekoj oni konsideris simple naturaj, tute evidentaj kaj „senpagaj” havaĵoj la puran aeron, la bonan trinkakvon, la netuŝitajn pejzaĝojn. Nuntempe tiuj bezonas jam multrilatan protektadon, komunan zorgadon per egaj elspezoj. La sciencateknika evoluo, la ekonomia disvolvo dialektike interrilatas kun la homa medio: la profunda kaŭzo de la difektiĝoj en la homa medio troviĝas en la disvolvado de la materia produktado kaj ties komercado. Por disvolvi la ekonomion, la homo intervenas en la naturfenomenojn, akcele ekspluatas la subterajn kaj surterajn riĉaĵojn, la akvojn kaj la arbarojn. Utiligante tiujn per industriecaj metodoj oni grandamase produktas vegetalojn, animalojn kaj fabrikaĵojn. Al la kontraŭnaturaj, amasaj produktadmanieroj aldoniĝas la plej modernaj, ĉie trafikantaj maŝinaj veturiloj, kaj la akcela urbanizado de agrikulturaj regionoj, eĉ de iam virgaj, turismaj pejzaĝoj.

En la ekspozicio. Maldekstre la ŝildo: „La homo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo"

La damaĝoj kaŭzitaj de la ekonomia progreso, en la natura kaj homa medioj, la malboniĝo de ties kvalito bremsas la pluan ekonomian disvolvon. Post ekspluata mineralfosado postrestas foje ruinigita, vastarea grundo, desur kiu la eroziantaj ventoj kaj akvoj multon forigas kaj nocas al la proksimaj kampoj kaj fluoj. En areoj, sub kiuj okazis ampleksa min-ekspluatado, akvoj forkondukiĝas kaj tiel malutilas al la surtera vegetaĵo. Pro malpliigo de la loka akvohavaĵo ankaŭ la akvoprovizado de la loĝantaro kaj entreprenoj iĝas pli malfacila kaj multekosta.

Estas konate, kvankam ne sufiĉe, ke la uzado de kemia agrotekniko (kemiaj sterkoj, sarkiloj kaj insektekstermiloj) sur la kampoj ankaŭ povas endanĝerigi la homon kaj ĝian medion. Nekonvene uzita, trodozita sterkado lasas forlaviĝi nitrogenon aŭ fosforon, kiuj sekve atingos riverojn aŭ lagojn, same kiel la kemiaĵoj protektantaj vegetaĵojn disfluas pere de la precipitaĵoj. Tiuj origine utilaj kemiaĵoj jam malutilas ekster la loko kie ili estis aplikitaj.

La neregulitaj defluoj kaj grundakvo-niveligoj povas kaŭzi gravajn damaĝojn: pereon de grundoj, elsodiĝon de kampoj, elfalon de kultivataj terenoj, k.a.

Dum intensa agrikultura kaj industria produktado amasiĝas rubaĵoj kaj defalaĵoj (organikaj kaj neorganikaj, flugcindro, fulgo, gasoj, k.a.), kiuj kapablas polucii la grundon, akvon kaj aeron.

La modernaj veturiloj, maŝinoj kaj aparatoj pro la ega disvastiĝo kaŭzas – pere de bruado, vibrado kaj per senpera malpurigo – ankaŭ korpajn difektojn. La urbanizado pliigas la loĝdensecon, la hejmaj defalaĵoj (pro netaŭga hejtado ofte ankaŭ fumgasoj kaj fulgo), kunportas multspecajn damaĝojn, precipe, se la komunumo nesufiĉe zorgas pri likvidado de tiuj rubaĵoj. La supraj damaĝoj havas ankaŭ estetikan aspekton: krom loĝlokoj ankaŭ pejzaĝoj tro perdas el siaj belecoj.

Evidentas, ke kun la civilizacio kaj soci-evoluo pli kaj pli iĝas necese lukti kontraŭ la amasiĝantaj problemoj de la medio, pli intense protekti ĝin. La spertoj pruvas, ke ju pli altgradiĝas la evoluo de la lando, des pli amasiĝas la mediaj nocoj. Tio devenas ĝenerale de la malvasta, unuflanka entreprena intereso, en kies fokuso staras profitemo, sekve neglektemo koncerne la mediajn

Pereo de fiŝoj havas gravan polucion

damaĝojn fare de la produktado. Aperas do tendenco preterlasi la preventadon kaj forigon de tiuj damaĝoj, ankaŭ pro la kostoj, kiuj povas malpliigi la profiton. Tiu tendenco regis tre firme ĝis nun en la industrie plej evoluintaj landoj. Ties sekvoj videblas en la ege multaj difektiĝoj tra la mondo, pro kiuj la homaro nun tiom maltrankvilas.

Kompreneble, se tiu malfavora tendenco plene kaj senĝene daŭrus, la homa medio rapide difektiĝus, ofte eĉ sen ia eblo de riparado. Bonŝance, nun jam en preskaŭ ĉiu lando oni klopodas bremsi tiun tendencon per ŝtataj disponoj – la feliĉo de la publiko pli gravas ol la malvastaj interesoj.

Ankaŭ la Hungarlandaj mediaj nocoj devenas de la rapidega ekonomia disvolvo, kaj de la same rapida urbanizado. La problemsolvo kondukas al la integra laŭplana ekonomia disvolvado, enhavanta ankaŭ la medioprotektadon. Tamen tiun principon transigi en la praktikon estas komplika afero, eĉ parte novtipa tasko. Ĝi postulas krei rimedojn – enkadre de la ekonomia direktado –, kvazaŭ mekanismon, kiu malhelpu la detruon de la medio. Kompreneble necesas ankaŭ juraj rimedoj por moderigi la poluadon fare de la entreprenoj kaj ebligi la produktadon sen perturbo de la medio.

La ordiga principo ĉe la evoluigaj planoj estas do la sinteza kombinado de la teknika, ekonomia kaj medioprotekta vidpunktoj. Oni devas konsekvence validigi la principon, laŭ kiu la damaĝanto de publike posedataj naturtrezoroj devas likvidi la damaĝon, kaj kompensi pro la perdo (ekz. restarigi la akvokvaliton).

Tra la mondo oni multe diskutas, ĉu la difektiĝoj de la medio estas necesaj kaj neeviteblaj dum la sciencateknika revolucio? Estus malfacile respondi tiun unuvorte.

Iasence, ĝis certa mezuro ili estas neeviteblaj sekvoj de la industria kaj teknika disvolvo. Tamen estas neniel necese, ke la scienca-teknika revolucio difektu la naturon, minacante bazajn vivkondiĉojn de la homaro. Oni ne forgesu, ke la teknika progreso ne nur damaĝas, sed ankaŭ plibonigas kaj favore transformas la homan medion. Kaj la medio enhavas ankaŭ tiujn cirkonstancojn – krom la heredita naturo – kiujn la homaro transformanta la naturon pli-malpli konscie kreis kaj kreos por si.

La damaĝojn, kaŭzitajn de la tekniko, oni devas ripari pere de la tekniko, kune kun la naturo. Per zorgado eblas malpliigi la danĝerojn, bremsi la dekadencon, multloke eĉ restarigi la antaŭan staton. Per ĝusta antaŭvido eblas eĉ anticipi la malbonon. Ne indas paniki, sed zorgema antaŭvido certe necesas, la pluaj damaĝoj eviteblas, se la homaro prudente uzas siajn rimedojn. Tiam eblos firme esperi, ke ni heredigos al la sekvaj generacioj la Teron tia, ke ili kun plena plezuro posedos ĝin.

La vizitantoj de la ekspozicio ricevis ampleksajn informojn pri la armilaro de la medioprotektado. Estis vaste prezentitaj ankaŭ la problemoj de akvoj, la protektado de la akvokvalito, ties manieroj kaj metodoj, kaj ne laste ankaŭ la solvendaj taskoj kaj farendoj, precipe en Hungarlando.

La ekspozicio reliefigis la gravecon de la multaj luktoj por protekti la akvohavaĵon. La granda intereso de la publiko klare montris, ke oni vaste scias kiel determina faktoro estas la akvo koncerne la socian-ekonomian disvolvon.

La vivo de la homo, ĝia tuta, multflanka agado dum sia ekzisto, konstante intervenas en la naturprocezojn, ankaŭ en la hidrologiajn procezojn. Kaj ĉiuj ĉi intervenoj – sendepende ĉu utilaj aŭ ne – rompas la naturan ekvilibron, ekigas ŝanĝojn, kiuj sekvigas ofte ankaŭ malutilajn efektojn. Nuntempe kreskas la intenseco de la homaj intervenoj en la hidrologiajn procezojn. La tiucelaj establaĵoj akcele plimultiĝas, kaj tiel ankaŭ ampleksiĝas la spaco de la homaj agadoj modifantaj la hidrologiajn fenomenojn.

Moderna kloakakvo-purigejo





Grandegaj ujoj de akvoprovizejo utiliganta riverakvon (Szolnok)

La specifa akumulanta rolo de la akvo, pro kiu ĝi amasigas ĉiajn toksajn substancojn kaj transportas ilin, povas forte endanĝerigi la naturon. La sekvoj estas gravaj malsanigaj efektoj, financaj perdoj, eĉ povas detrui la normalajn vivkondiĉojn. Dum sia cirkulado la akvo plurmaniere efikas je la ceteraj substancoj de la naturo, do ne eblas neglekti, ĉu tiu efiko estas utila aŭ ne. La multflanka graveco de la akvo, la kresko de la sociaj akvobezonoj unuflanke, la relativa malmulteco de la dolĉakvo kaj ĝia minaciteco aliflanke, ĉiuj ĉi postulas, ke koncerne ĝin plene efektiviĝu la modernaj ekologiaj principoj.

La ekspozicio PROTENVITA prezentis konvenajn informojn pri la nuna poluiteco de la riveroj kaj lagoj, kaj pri la faritaj kaj farotaj akvoprotektaj disponoj. La vizitantoj ekkonis diversajn teknikajn metodojn por reguligi akvokvaliton. Montriĝis ankaŭ per aerfotoj, kiamaniere aliigas la pejzaĝon la hidroteknikaj konstruaĵoj, valbaraĵoj kaj artefaritaj lagoj, kiuj dum la homa historio akompanis kaj antaŭenigis la civilizacion. Aparte emfazis la ekspozicio la protektadon de la lago Balatono, kion la publiko – ne nur en Hungario, sed en tuta Mezeŭropo – sekvas per vigla intereso. Eblas paroli pri novtipaj poluciaĵoj – ekzemple nafto-enfluo – ĉe maroj kaj riveroj, kaj en la akvo, kaj sur la bordoj. Ekspoziciaĵoj elmontris la plej modernajn teknikajn rimedojn per kiuj la hidrologiaj instancoj malkovras kaj forigas tiujn ege danĝerajn misaĵojn de la industrio kaj transporto.

Okazis sincera kaj tre impresa ekspoziciado de la homaron minacantaj detruadoj, kiujn homoj okazigas *dum paca laboro.* Aliaj ekspozicioj prenas sur sin tutmonde la gravegan taskon: elmontri la teruregajn sekvojn de la moderna milito kapabla ĉion pereigi, kaj tiamaniere alvoki la homojn de ĉiuj landoj por nepre malebligi ĝin.

Tradukis: Ervin *Fenyvesi*

Post inundoj oni ekstermas la kulojn

LITERATURA METIEJO

Post certa paŭzo aperas denove nia rubriko, en kiu ni kutime taksas konkursajn tradukojn. Ĉifoje la tradukaĵoj alvenis sen peto perletere, tamen du diversaj tradukoj el la sama poemo vole-nevole devigas nin por komparo. – Ties rezulto estas nia nuna metiejo.

La iniciatoro estis s-ino Bella Sipos, plurfoja kontribuinto al tiu ĉi rubriko; ŝi elektis taskon malfacilan tradukante poemon de Petőfi: „A tintásüveg" (La inkbotelo). Post ricevo de ŝia letero alvenis al nia redakcio aro da manuskriptoj, senditaj de d-ro Miklós *Fehér* el urbo Miskolc. Inter liaj tradukaĵoj troviĝas kelkaj pli sukcesaj pecoj, ni tamen elektis ankaŭ de li „La inkbotelo"-n, ĉar ĝi paralele kun tiu de B.S. liveras al niaj legantoj iom da instruo.

Por komenco ni vidu la originalon kaj ties laŭvortan tradukon.

Vándorszínész korában *Megyeri*
(Van-e, ki e nevet nem ismeri?)
Körmölgeté, mint más, a színlapot.
Kapott
Ezért
Egyszer vagy ötforintnyi bért,
Amint mondom, vagy ötforintnyi bért.

Először is hát tintáért megyen,
Ha ismét írni kell, hogy majd legyen.
A tintás üveget pedig hová
Dugá?
Bele
Kabátja hátsó zsebibe,
Amint mondom, kabátja zsebibe.

S hogy pénzre tett szert, lett Megyeri víg,
S hazafelé menvén ugrándozik.
Hiába inti őt Szentpéteri:
„Kari,
Vigyázz!
Kedved majd követendi gyász,
Amint mondom, majd követendi gyász.

Ugy lett. A sok ugrándozás alatt
kifolyt a tinta; foltja megmaradt.
Megyeri elbúsul – kedvét szegi
Neki
A folt,
Mivel csak egy kabátja volt,
Amint mondom, csak egy kabátja volt.

Mi több, kabátja éppen sárga volt,
És így annál jobban látszott a folt.
„Eldobnám – szólt – de mással nem bírok;
Ez ok
Miatt
Hordá, míg széjjel nem szakadt,
Amint mondám, míg széjjel nem szakadt.

Laŭvorte:

Kiam estis *Megyeri* migranta aktotoro, / ĉu estas iu, kiu ne konas ĉi nomon? / Kiel aliuloj, ankaŭ li skribadis teatrajn programojn / Pro tio/ Li ricevis/ Foje kvin forintojn de salajro/ Kiel mi diras, kvin forintojn de salajro./

Unue li do ekiris por inko/ Por ke venontfoje li havu ĝin./ Kaj la inkujon li metis/ do kien? / Enen,/ En la dorsan poŝon de sia jako/ Kiel mi diras, en poŝon de la jako./

Kaj ricevinte monon *Megyeri* iĝis gaja,/ Hejmenirante li kapriolis./ Vane lin avertis *Szentpéteri:*/ „Karĉjo, Atentu! / Post via ĝojo sekvos funebro,/ Kiel mi diras, sekvos funebro./

Kaj okazis tiel. Dum la kapriolado/ Elfluis la inko, tie restis ĝia makulo./ *Megyeri* malĝojiĝis – la bonhumoron forigis/ De li/ La makulo,/ Ĉar li havis unusolan jakon,/ Kiel mi diras, unusolan jakon./

Eĉ pli; lia jako estis ĝuste flava,/ Kaj tiel des pli videbliĝis la makulo./ „Mi forĵetus ĝin – li diris – sed alian mi ne havas! "/ Pro tiu/ kaŭzo/ Li ĝin portis, ĝis ĝi disŝiriĝis,/ Kiel mi diras, ĝis ĝi disŝiriĝis.

La poemo estas unu el la gajaj, anekdoteskaj poemoj de Petőfi el la jaro 1844. Tiutempe li jam finis sian aktoran karieron (ne tre sukcesan), kaj iom nostalgie, iom liberiĝinte prikantis siajn teatrajn travivaĵojn, memorojn.

Megyeri estis unu el la plej famaj aktoroj de tiu epoko.

Laŭforme la poemon konsistigas kvin strofoj, la strofojn po sep versoj. Inter tiuj la unuaj estas deksilabaj, la meze starantaj mallongaj versoj dusilabaj, poste sekvas oksilaba kaj denove deksilaba verso. Trifoje ni trovas paran rimon, post la tria sekvas ripeto, do la rimformulo estas: *aabbccc*.

Se ni esplorus nur tiom, ni trovus, ke la alsenditaj tradukoj estas proksimaj al la originalo. Ni rigardu ilin unu post la alia.

Megyeri estiel migranta trupano
(Certe ĉi aktoron konas jam la famo)
Teatrajn programojn skribi entreprenis.
Kaj venis
La gajno:
Sume kvin forintoj da salajro,
Dirite, kvin forintoj da salajro.

Unue li volis por inko ekiri,
Ke ne lastmomente devu ĝin akiri.
Kaj kien li kaŝis akiraĵon bluan,
La fluan?
Konduto
Kia! En la poŝon de surtuto,
Dirite, en la poŝon de surtuto.

Pro la salajro bunhumoro venis,
Dum hejmeniro li kaprioli emis.
Vane avertis lin amika voĉo:
„Kaĉjo,
Ĉi-fojon
Ne sekvu malĝojo la ĝojon!"
Dirite, malĝojo la ĝojon.

Dum la kapriola kuro, jen okazis:
Elfluis inko, nur makulon lasis.
Megyeri tristis pro malgaja sperto,
Ĉar perdo
Lin trafis,
Ja li unusolan surtuton havis,
Dirite, li solan surtuton havis.

Eĉ, ĉar flava estis la surtuto,
Pro inkmakulo damaĝiĝis tuto.
„ – Ĉu ĵeti for? – mi povas neniel."
Tiel
La spita
Portis ĝin, ĝis fariĝis ĉifonita,
Dirite, ĝis fariĝis ĉifonita.

Tr.: B.S.

Tiu traduko je unua rigardo plaĉus al ni, apenaŭ troveblas en ĝi riproĉindaĵoj. La ritmo diferencas iom de la originalo, sed ĝi same estas vigla. La tradukinto je unu-du silaboj plilongigis la versojn (kvankam nekonsekvence), ŝi konsideris kaj redonis ankaŭ la rimaranĝon, kaj koncerne la enhavon ni sentas nenian mankon. B.S. estas verŝajne instinkta tradukanto, la hungarlingva poemo eĥas al ŝi en Esperanto, kaj ŝi ne multe hezitas, tuj surpaperigas la eĥon. Aŭ la rimparo: *gajno – salajro* estas tamen rezulto de rafinita spekulado post pluraj skribaj variantoj? Fakte tiuj du vortoj similas nur en skriba formo, niaj oreloj ne akceptas ties kunrimiĝon. B.S. kuraĝe eksperimentas ankaŭ per kunrimigo de *voĉo* kaj *Kaĉjo* (karesnomo por Karlo), sed la efiko estas iom duba.

Tiu traduko – kvankam ne tre preciza – tamen estas laŭdinda. Kontraŭe: troa precizemo karakterizas tradukon de M. Fehér.

Kiam estis migraktor' *Megyeri,*
(Mi pri kiu volas nun fabeli)
Skribi la programon li tre emis,
Ricevis
Pro tio
Kvin forintojn da premio,
Jen mi diras: tiom da premio.

Por ke povu skribi, do aĉetis
Inkon li. Sed kien enmetis
La botelon? Ĝin li ŝovis kien?
Nu kien?
Ĉielo!
En la poŝon de mantelo,
En la poŝon de mantelo.

Pro la mon' vigliĝis tre Megyeri,
Ĝis saltad' humor' komencis ŝveli.
Diris al li kunul' amike,
Predike:
„Funebro
Sekvos ĝojon, jes funebro! "
Jen mi diras: Ĝojon la funebro.

Vort' veriĝis. Pro la vigla salto
Ink' elfluis, makuliĝis parto
Dorsa. Sekvis tuj malĝoj' giganta,
Ho granda
Ĉielo!
Apartenis al li nur mantelo,
Jen mi diras: unu nur mantelo.

Eĉ! Mantelo estis ĝuste flava,
Des pli estis la makul' malrava.
„Mi forĵeti ĝin tuj nun deziras" –
Li diras.
Alian
Li ne havis, do surhavis tian.
Jen mi diras: jes, longdaŭre tian.

(Tr. M. Fehér)

La tradukinto de tiu ĉi varianto klopodis por plena precizeco: li rigore kalkulis silabnombrojn, eĉ provis redoni ankaŭ vortordon de la originalo. Certe estis por li ne facile trovi rimon al ĉe la versfino staranta propra nomo *Megyeri*, sed li trovis eĉ du: *fabeli, ŝveli.* Por rimsolvo tiuj estus akceptebla j, sed ŝajnas arbitre enmetitaj en la tekston.

La tradukinto pro ĝojo pri akiritaj rimoj forgesis kontroli ties taŭgecon laŭ signifo. Vere: *pro tio – premio* estas bona rimparo. Sed *premio* laŭ PV signifas: 1. Rekompencon, donacatan al la plej indaj; 2. Donacon proponatan al aĉetantoj – do ne la samon, kiel en la hungara lingvouzo la latindevena vorto *prémium,* kiun aŭdante ĉiu (hungaro) pensas pri pagita mono, kromsalajro.

Aliloke la tradukinto aplikas finaĵrimojn (*emis-ricevis*), aŭ simplan ripeton: *kien, Nu kien? funebro-funebro.*

Kompare la du tradukojn konstateblas ia ritmo ĉe B.S., sed aŭdante tiun de d-ro Fehér niajn orelojn trafas malmulte da agrablaĵo. Pro troa precizemo pri silabnombroj venis unu apud la alian pluraj unusilabaĵoj aŭ mallongaj vortoj, kiuj rezultigas malbelan sonoron. *(Mi pri kiu... ĝin tuj nun...)*

Kaj ĝis nun temis nur pri verslongo kaj rimaranĝo. Sed ja al ritmo kontribuas ankaŭ aliaj faktoroj!

Petőfi eksentis la adekvatan formon kaj konscie (eĉ, se ne ĉiam precize) aplikis ĝin; ne estas do hazarde en lia poemo la jamba ritmo! Fakte, ĉe li la versojn deksilabajn konsistigas kvinjamboj, la dusilabajn jambo, la oksilabajn kvarjamboj. (Ne ĉiam puraj, sed klare rekoneblaj.)

Konsiderante tion, mi retradukis la poemon, plilongiginte ĉiun verson per unu silabo, por eviti oftajn virajn rimojn, tamen rekrei iom el la jamba pulsado, kiu donas viglecon konvenan al gaja temo. Ĉu mi sukcesis? Pri tio decidu niaj legantoj.

M.F.

• • •

La inkbotelo

Megyeri kiel aktoro migranta
(La nom' konatas por publik' enlanda)
Teatr-afiŝojn kopiis kutime.
Nu, fine
Ĉi ago
Portis kvin forintojn da pago,
Kiel dirite, jen tiom da pago.

Komence iris li por ink' elane,
Ke en bezon' li havu ĝin ĉemane.
Kaj la inkujon li metis do kien?
Nu li, – jen
Kia ag'!
Lokigis ĝin en poŝon de la jak',
Kiel dirite, en poŝon de la jak'.

Pro mon' Megyeri viglis dum la vojo,
Li kapriolis ebria pro ĝojo.
Kaj venis far kolego atentigo:
„Amiko,
Laŭ eblo
La ĝojon ne sekvu funebro!"
Kiel dirite, ne sekvu funebro.

Kaj jen, okazis. Pro saltado, kuro,
La ink' transfluis, restis nur makulo.
Megyeri-n kaptis tristo, kaj ĉagreno
Pro jeno
Lin trafis:
Li solan jakon, unusolan havis,
Kiel dirite, nur solan li havis.

Eĉ, tiu jako ĝuste flava estis,
Des pli makulo pri inko atestis.
„Forĵetus mi, sed alian ne havas.
– Ne gravas."
Tiel ĝin
Li portis ĝis krevo, ĝis la fin',
Kiel dirite, ĝis krevo, ĝis la fin'.

Traduko de Márton *Fejes*

Georgi Mihalkov

LA ARGILA KAMELO

La objektoj ankaŭ vivas. Ili silente vivas ne nur ĉirkaŭ ni, sed ankaŭ en nia memoro kaj vivo. Se la objektoj povus paroli, ili rakontus al ni mirindajn jarcentajn historiojn, ĉar ilia vivo, kompare kun ni, ofte estas senfina.

Jam de multaj jaroj sur mia skribotablo staras argila kamelo; helflava, du-ĝiba, eble ne pli alta ol kvardek centimetroj. Sur ĝi sidas kvin homfiguroj, kvin ĉinaj muzikantoj kun strangaj muzikiloj.

La longa kapo de la kamelo estas streĉe levita, la buŝo malfermita kaj ŝajnas al mi, ke la grandaj humidaj okuloj esprimas profundan mutan doloron.

Miaj konatoj opinias, ke tiu ĉi argila kamelo estas unika. Eĉ mia amiko, fakulo pri aziaj artoj, tre serioze asertas, ke la kamelo devenas el la epoko de la ĉina Tang dinastio, kiu regis inter la jaroj 618 kaj 907.

Tamen ĉiam kiam mi alrigardas la kamelon ne pri Tang dinastio mi pensas, sed pri malproksima jaro de mia infaneco. Tiam mi kun panjo ofte vizitis iun strangan familion kies nomon mi jam ne memoras aŭ neniam mi sciis. Ĉu tiuj homoj estis niaj parencoj aŭ konatoj, ankaŭ tion mi ne scias kaj verŝajne mi neniam plu ekscios.

Ni vizitis ilin eble unufoje en ĉiu monato kaj ĉiam precize mi divenis kiam ni iros tien, ĉar panjo vestis min per miaj plej novaj vestoj. Tio estis blanka pantalono el krudsilka ŝtofo kaj blanka marista bluzo kun granda blua kolumo. Panjo zorge kombis mian hirtan hararon kaj neniam forgesis aldoni, ke tie mi devas konduti dece kaj bone.

Ni veturis per tramo, aŭtobuso, descendis ĉe larĝa bulvardo, piediris iomete kaj ĉiam ekstaris antaŭ vasta ĝardeno kun alta fera barilo. Panjo sonorigis kaj minuton aŭ du ni atendis la alvenon de iu magra viro kiu longe, zorge malŝlosis la pezan grincan pordon. Ŝajnis al mi, ke tiu grizokula viro ne scias nian lingvon, ĉar ĉiam nur unu solan frazon li eldiris:

– Bonvolu, sinjorino.

La viro, panjo, mi, trapasis la ĝardenon kaj iris en trietaĝan domon kie en vasta salono ni devis atendi denove. Tie ĉiam obsedis min nekomprenebla maltrankvilo, kvazaŭ mi estis en malsanulejo. Panjo sidis ĉe eta tablo, mi senmove staris kaj gapis la malhelajn portretojn sur la blankaj muroj kaj kiam jam tro longa ŝajnis al mi nia atendado tie, unu flanka pordo malfermiĝis lante kaj la magra viro seke diris:

– Bonvolu, sinjorino.

Denove ni triope, la viro, panjo, mi trapasis obskuran longan koridoron kaj eniris grandan ĉambron kie sidis sinjorino leganta libron. Ŝi estis ne tre juna, sed ankaŭ ne maljuna kun frizistaj arĝentaj haroj kaj vizaĝo glata kiel metalo.

Ĉiam kiam ni eniris, la sinjorino metis flanken la libron kaj per unu sama monotona voĉo diris:

– Saluton, kara Marta.

Panjo kiŝis ŝin humile. Min la arĝentharara sinjorino kvazaŭ ne vidis kaj tial mi restis ĉiam malantaŭ la dorso de panjo.

En la granda ĉambro troviĝis sennombraj mebloj kaj aĵoj. Sur la muroj estis pentritaj nekonataj floroj, birdoj, arboj kaj inter ili strangaj homoj kun etaj okuloj kaj longaj vestoj. En la impona vitroŝranko orde staris porcelanaj teleroj, krucetoj, glasoj, tasoj. Sur la tablo estis vazoj, ankaŭ porcelanaj, riĉe ornamitaj. Sur la alta libroŝranko videblis multaj statuetoj kaj skulptaĵoj. Kelkaj murhorloĝoj tiktakis monotone kaj dormige.

En tiu vasta ĉambro mi sentis min fermita kvazaŭ en kaĝo kaj eĉ paŝon mi ne kuraĝis fari por ke mi ne faligu kaj ne rompu iun el la sennombraj skulptaĵoj, statuetoj, vazoj.

Tamen mi ne povis elteni tutan horon sidi senmova sur unu sama loko kaj ofte mi atente proksimiĝis al la fortepiano sur kiu staris du allogaj statuetoj. Neniam mi povis kontraŭstari al la tento kaj ne observi ilin de iom pli proksime.

La unua statueto estis ĉevalo; argila, flavbruna

kun masiva verda selo. Verdaj estis la okulŝirmiloj kaj se mi bone rememoras, ankaŭ la brido. Mi ne scias kial, sed la vosto de ĉevalo estis kruta kaj plektita. La ĉevalo havis sveltajn krurojn kaj ŝajnis al mi, ke nur post sekundo ĝi ŝtorme ekgalopos. Tiel streĉa estis ĝia korpo kaj el ĝi radiis ne nur forto, sed ankaŭ fiero.

La alia statueto estis la kamelo, la argila flava kamelo sur kies dorso sidis la kvin ĉinaj muzikantoj kun la strangaj muzikiloj, sed tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke ili estas muzikantoj kaj eĉ timigaj ŝajnis al mi iliaj vizaĝoj kun okuloj etaj kiel fendoj. Ankaŭ antaŭe sur diversaj bildoj mi vidis kamelojn, tamen tiu ĉi kamelo ne estis tute sama. Ĝia levita kapo esprimis kvazaŭ doloron kaj ĝiaj okuloj plenis de angoro. Mi sentis eĉ kompaton al tiu ĉi kamelo kaj mi ne sciis kial, sed al mi ŝajnis ĉiam, ke sur sia ĝiba dorso la kamelo portas ne nur la kvin strangajn homojn, sed la tutan grandan ĉambron kun ĉiuj mebloj kaj aĵoj.

Mi povis ege longe observadi la ĉevalon kaj kamelon. Dume panjo kaj arĝentharara sinjorino mallaŭte konversaciis. Pli ĝuste panjo parolis kaj la sinjorino nur aŭskultis aŭ de tempo al tempo monotone ŝi aldonis, ke hodiaŭ tutan tagon pluvis aŭ malvarmas aŭ Fred ne povis promenadi kun la hundo. Sed neniam mi komprenis kiu estas Fred kaj pri kiu hundo temas.

Foje, foje en la ĉambro aperis alta blonda viro, ege eleganta, kiu mankisis panjon kaj karesis min amike. Li ne restis longe en la ĉambro kaj pli ofte li nur diris:

– Kara, mi foriras. Sinjoro Tot atendas min en la kontoro.

Kiu estis tiu blonda viro kaj kiu estis sinjoro Tot, mi ne scias.

Tamen mi neniam forgesos, ke ofte kiam ni ekstaris por foriri, kvazaŭ subita forta varmo obsedis panjon kaj ĝene ŝi menciis, ke ankaŭ en tiu ĉi monato ni ne povis lupagi la loĝejon.

– Iam mi diris: ne edziniĝu al laboristo – murmuris la sinjorino kaj el nigra mansaketo ŝi elprenadis kelkajn monbiletojn.

Panjo dankhumile kisis ŝin kaj ni foriris.

Ĝis la ĝardena pordo akompanis nin la magra viro kiu ĉiam nur unu solan frazon diris: „Bonvolu, sinjorino."

La monatoj pasis. Ni kun panjo ofte staris antaŭ la granda domo, atendantaj la magran viron, kiu sola havis la honoron ŝlosi kaj malŝlosi la masivan feran pordon.

En la ĉambro, dum unu tuta horo, ĝis kiam panjo kaj arĝentharara sinjorino mallaŭte konversaciis, mi heroe kaj silente devis sidi kaj eble, se ne estus tie, sur la fortepiano, la argila kamelo, mi ekdormus pro enuo kaj tediĝo. Mi rigardis la kamelon kaj imagis, ke ankaŭ ĝi pli bone sentus sin en alia domo kie ne estas tiom da mebloj kaj nenecesaj aĵoj.

Foje en la granda domo io kvazaŭ ŝanĝiĝis. Unu tagon kiam ni denove iris tien, en la ĉambro sidis ankaŭ la blonda viro kaj dum tuta horo li senmova legis furnalon. Li eĉ ne ekstaris kaj ne diris, ke li foriras aŭ sinjoro Tot atendas lin en la kontoro. Eble tial, kiam ni ekstaris por foriri, panjo ne menciis, ke ankaŭ en tiu ĉi monato ni ne povis lupagi la loĝejon.

Sur la strato panjo estis maltrankvila kaj ĝis la hejmo ŝi kvazaŭ forgesis pri mi.

La sekvan fojon la blonda viro denove sidis en la ĉambro, sed tie io mankis. Mi longe cerbumadis ĝis kiam mi konstatis, ke la ŝranko kiu staris apud la divano nun jam ne estas tie.

Post monato ankaŭ la granda librošranko ne estis plu en la ĉambro. Tiam mi ankoraŭ ne komprenis kial el la ĉambro malaperas unu post alia mebloj kaj aĵoj. Kiel ĉiam la arĝentharara sinjorino kaj blonda viro silente sidis tie, sed la vizaĝo de la sinjorino ne estis tiel glata kaj el ŝiaj bluaj okuloj gvatis maltrankvilo. Nun ŝi pli multe paroladis kaj kvazaŭ eĉ min ŝi rimarkis, ĉar foje ŝi karesis mian kapon kaj lamente diris:

– Ni maljuniĝis, sed lia sorto kia estos?

Iom post iom preskaŭ ĉiuj mebloj malaperis el la ĉambro kaj nun ĝi aspektis tiel granda, ke se mi ekkrius forte mia voĉo longe ĥus kiel en barelo.

Tamen kiam ankaŭ la fortepiano malaperis, serioza maltrankvilo min obsedis. Verŝajne sekvan fojon ankaŭ la argila kamelo ne estos plu ĉi tie. Mi deziris eĉ ekplori, ĉar jam delonge mi imagis, ke ĉiufoje la kamelo atendas min kaj kiam mi sidas ĉi tie, ĝiaj okuloj ne estas tiel malĝojaj.

Iun posttagmezon kiam ĉe la peza fera pordo panjo sonorigis, la magra viro ne alvenis. Vane ni atendis minuton, du, tri... Panjo provis malfermi la pordon kaj por mi plej granda surprizo ĝi ne estis ŝlosita. Ni solaj eniris la domon.

Nun la argila ĉevalo ne estis en la ĉambro kaj sur la planko orfe staris la kamelo. Mi jam certe sciis, ke venontfoje ankaŭ ĝi ne estos ĉi tie kaj

dum la tuta horo mi silente adiaŭis la kamelon. Tamen ne nur doloron, sed ankaŭ iom da ĝojo mi sentis, ĉar finfine ankaŭ la argila kamelo forlasos tiun ĉi silentan kaj obskuran domon.

Kiam ni ekstaris por foriri, panjo kisis la arĝenthararan sinjorinon kaj donis al ŝi kelkajn monbiletojn. Panjo ruĝiĝis, ĉar ŝi ne estis certa ĉu la sinjorino akceptos ilin aŭ ne. La sinjorino faris tian geston kvazaŭ ŝi eĉ ne dezirus vidi la monon, sed poste ŝia tremanta vaksa mano prenis la monbiletojn kaj metis ilin sur la tablon. La blonda viro kiu sidis en la fotelo rimarkis kvazaŭ nenion, sed al mi ekŝajnis, ke li bone vidis kion panjo donis al la sinjorino.

La arĝentharara sinjorino ekstaris lante, prenis la kamelon kaj donis ĝin al mi. Stupore mi rigardis kaj ne deziris kredi tion.

— Ĝi estu la via — diris la sinjorino. En ŝia voĉo nek bedaŭron, nek lamenton mi eksentis.

Kiam mi eliris sur la straton, mi ne sciis ĉu mi estas ĝoja aŭ malĝoja. Mi forportis la kamelon, kiu eble estis inter lastaj aĵoj en tiu granda kaj obskura domo. Mi sentis min savanto kaj rabisto.

Pluvis. La ĉielo tondris kaj purpuris. Ĉu pro fulmoj aŭ pro foraj pafoj? Malantaŭ mi silente staris la impona granda domo, jam malplena. Miaj manoj premis la kamelon. La sorto min elektis, ke mi transportu ĝin de unu epoko al alia.

GAJA PAĜO

Aĥ, nervozo!

La neŭrologo adiaŭas la ĉarman pacientinon: — Do ni finis la terapion... la restintajn inhibiciojn vi certe bezonos ankoraŭ!

Surstrata surprizo

— Sinjorino kara, aŭskultu, tute honeste mi intencas...
— Ĉu vere? Mankas al mi la tempo tiucele...

Lunatiko

— Se vi jam promenas nokte sur la tegmento, bonvolu ripari mian televid-antenon — ricevis proponon la somnambulo.

Fumatiko

— Kiomfoje mi ripetu, ke vi devas dekutimiĝi de fumado! La nikotino estas ja *malrapide* mortiga veneno.
— Sed, kara doktoro, ĉu mi ekfumadu cianon por plaĉi al vi?

Matematiko (aŭ gramatiko?)

— Ĉu vi aŭdas? La trajno alvenos post duhora malfruiĝo, do mia edzino malvenas nun. Do por 120 minutoj mi refraŭliĝas. Kia feliĉa diferenco!

En nova jaro

La jaro 1983 certe novas, eĉ post du monatoj jam forpasintaj. Sed restis malnovaj la

edzinoj	edzoj
bopatrinoj	naivuloj
amatinoj	amataj viroj
amataj inoj	amantaj malinoj
amikinoj	drinkejpartneroj
kuracistoj	pacientoj
uloj	kelneroj

kaj iliaj ĉiamaj ridindaĵoj — je via sano kaj gajo!

Mi forgesis pri futbalistoj...

La najbarlanda teamo ĵus aperis — ekkriis la radioraportisto — kaj mi malgaje rimarkas, ke la vento blovas ĝuste kruce tra la stadiono... bedaŭrinde tio ege helpos al niaj kontraŭuloj.

... Sed ne pri komfortuloj

Mia deziro estas modesta — li diris — ja, loĝi meze de granda arbaro, kie kantas birdoj, saltas sciuretoj, estus agrable, kompreneble kun apuda tramhaltejo.

Nervoza aĉ—etanto

— Mi proponas aĉeti tiun bravan hundon, bonegan domgardiston. Mi garantias: ekvidante ŝteliston, ĝi tuj atakos lin.
— Pardonon, mi prefere rezignos pri la aĉeto — balbutis ĝenite la aĉetanto kaj forpafis sin.

Szilárd Bálint

La ovo de Kolumbo

Ferenc *Mózes* laboris kiel ŝoforo ĉe transport-entrepreno, kie li havis konstantan taskon. Li devis preskaŭ ĉiutage liveri vivantajn kokinojn el granda agrar-kooperativo al alia kooperativo en malproksima landparto. Tie oni preparis kokinaĵojn por konsumo. Pro la longa distanco inter tiuj kooperativoj, la ŝoforo havis rajton, eĉ devon, meze de la longa vojo 8 horojn ripozi, dormi. Feliĉe, la hejmo de nia ŝoforo en eta vilaĝo, troviĝis preskaŭ ĉe la menciita meza punkto. Kompreneble, dum la regula pendolveturado Mózes kutime jam laca alvenis al sia domo, kie la edzino atendis lin kun varma vespermanĝo. Antaŭ tagiĝo, kiam la ŝoforo ankoraŭ dormis, la lerta edzino ĉiam vizitis la kaĝojn sur la ŝarĝaŭto, kaj zorge elprenis ĉiujn ovojn, kiujn la diligentaj kokinoj produktis dumvoje – ĝenerale 50-60 ovoj estis troveblaj.

Mózes ne faris zorgon por si pri tio, li trankvile manĝis el la ĉiam freŝaj ovoj, kies superfluaĵon la edzino rapide vendis. Tiu agado daŭris dum longaj jaroj sen ia ĝeno.

En la ĝardeno de la ŝoforo staris alta nuksarbo, kiu ĵetis ombron sur la najbaran korton, sur ties vinberujon. Pro manko de sunlumo la vinberoj restis kutime acidaj, kaj tio indignigis la najbaron. Li ofte atentigis la ŝoforon:

– Ferenc, bonvolu haki la nuksarbon! Nenio kreskas pro ĝia ombro en mia ĝardeno!

– Neeble, mia edzino neniam lasos ĝin haki!

Pasis la tagoj kaj monatoj. Foje la edzino de Mózes sarkis en la ĝardeno, kiam la najbarino el trans la barilo laŭte kriadis:

– Maria... denove ne floras... kial vi ne lasas haki la nuksarbon? !

– Vi estas stulta! Tiu arbo staras en nia ĝardeno, ĝi neniel koncernas vin! Cetere, tiu arbo produktas nukson tiel abunde, ke ni povas enspezi pere de ĝi.

– Nu, bone... sed mi denuncos vin, ke vi delonge ŝteladas la ovojn de la transportataj kokinoj! Kaj pro tiu ŝtelo oni certe arestos vin!

Tiel kverelis dum kelkaj semajnoj la virinoj, ĝis iutage Mózes kaj la edzino ricevis surprize alvokon al la tribunalo. Jen, la najbarino realigis sian promeson!

La juĝisto unue priaŭskultis la edzinon de la ŝoforo.

– Ĉu vi kutimis kolekti la ovojn?

– Jes... se mi ne farus tion, la ovoj certe rompiĝus dum la longa liverado...

– Sed tiuj ovoj ne apartenas al vi! Vi ŝtelis!

– Mi ne scias, al kiu ili apartenas... De kiu mi ŝtelis ilin?

La juĝisto eksilentis, gratis sian kapon. Sekvis la ŝoforo.

– Ĉu vi sciis pri tiu kulpo de via edzino?

– Jes.

– Do, vi estas kunkulpulo. Ĉu vi havas ion diri pri tio?

– Ne... nenion.

Venis la advokatoj de la firmaoj. Tiu de la produkta kooperativo rifuze diris:

– La ovoj certe ne apartenas al nia kooperativo. Ni kontraktis nur pri liverado de vivaj kokinoj, sed ne pri ovoj. Cetere, kiam la ŝarĝaŭto forlasas nian kooperativon, la ovoj ankoraŭ estas en la kokinoj... registri la ovojn estas do neeble...

La advokato de la transport-entrepreno tiel argumentis:

– Nia firmao ne komercas per ovoj, kaj entreprenas nur la transportadon. Se la adresatoj ne volas transpreni la restaĵon aŭ la produktaĵojn de la bestoj, tiam ni transdoninte la varon forbalaas la ceterajojn kiel malpuraĵon.

La juĝisto komencis ŝviti, sed sekvis ankoraŭ la tria advokato, nome de la prilaboranta kooperativo:

– Nia viando-fabriko tute ne bezonas ovojn, kiuj cetere alvenas dumvoje frakasiĝinte. Se hazarde kelkaj restus nerompitaj, kion ni faru per ili, ja al ni mankas loko por kolekti ilin. Post purigo de la kortbirdoj ni forsendas kutime ĉiun senutilan internaĵon por sterkoproduktado.

– Mi vidis – atestis la najbarino –, ke Maria ĉiam kolektis la ovojn dum longaj jaroj. Ŝi donacis al mi kelkfoje da ili, tial mi silentis. Sed post nia kverelo mi denuncis...

La retiriĝintaj juĝisto kaj asesoroj longe disputis pri la sekvaj demandoj:

1./ Estas klarigende, kiu estis la posedanto de la ovoj. La edzino certe ŝtelis, sed eble tion malgravigas ke ŝi savis valoron kontraŭ neniiĝo.

2./ La denuncantino parte estas kunkulpulino, same la ŝoforo, kiu ne protestis kontraŭ la ŝtelado. Ĉu punindaj?

3./ En la kokino la ovo ne estas registrebla, sed ŝin forlasinte ĝi jam ne apartenas al la vendita kokino-varo. La entreprenoj ne pretendas la posedrajton pri ĝi. Fine, la rompita ovo estas senvalora: ĉu ekzistas kulpeco, ŝtelado, sen valoraĵo?

Post unuhora disputo la tribunalo faris verdikton (en 30 tajpitaj linioj!), sed nia raportisto ne ricevis ĝin!

Kara Leganto! Ni petas de Vi la verdikton, kiun H.V. publikigos – sendepende ĉu Vi jam gajnis alifoje – kaj premios per libro.

Limdato: 2 monatoj post alveno de la revuo.

DAŬRIGO

de la novelo «Sub la turka jugo» *aperinta en la n-ro 1982/3. Ĝia aŭtoro estas Johano Mezei, Budapeŝto.*

Dum mi vagabondis en la montaro Balkan kaj admiris la ravan panoramon al la Rozavalo, ofte mi haltis kaj

ripozis ĉe paŝtistoj de grandaj ŝafaroj. Multe mi eksciis de ili pri interesaĵoj de la ĉirkaŭaĵo. Kiam mi foje menciis la nomon Bozukov, maljuna paŝtisto ekmiris pri la fremdulo, kiu konas liaŭn heroaĵon. Ne tute – mi respondis –, ĉar mi ankoraŭ ne scias, kiel lia filo Stojno sukcesis savi sin? La nepinon de Stojno mi jam ekkonis hazarde...

Kaj la maljunulo ekrakontis pri la vivo de la popolo sub la turka jugo, sed nun mi recitas sole la aferon de Stojno.

... La junulo kuris, kuradis al la valo, poste haste al la montdeklivo, supren, pli supren... ĝis antaŭ la supra arbarorando li haltis kaj plene elĉerpita, li ĵetis sin teren. Li kaŝis sin inter la arbustoj kaj atendis, atendadis. Kiu povas atendi, tiu povos pluvivi... tio estis tiutempe la leĝo de la montaro. Li meditis longe, eĉ dum la tuta nokto, ĉar li komprenis, ke de tiam estos li la orfa estro de sia familio. Pri la fina sorto de la patro restis nenia espero, tion la hardita filo de la luktanta kaj premita popolo devis jam klare konscii. Jen li priploris la patron, jen li kuraĝigis sin por sukcese kurieri, porti la leteron de la ribeluloj en Kalofer. Profunda dormo fermis liajn palpebrojn je krepusko, kaj sonĝe li triumfe revenis al Kalofer kun helptrupoj...

La tagmeza suno brilis tra la foliaro kiam Stojno vekiĝis. Li ne volis perdi pli da tempo kaj ekiris rapidpaŝe. Kvankam li klopodis iri laŭeble kaŝe, ĉe iu vojeto tamen haltigis lin turkaj policistoj. Liaj respondoj jam preskaŭ trankviligis ilin, kiam dum korpa esploro troviĝis la letero. Ne komprenante la skribon, la knabo estis eskortita al komandanto. Tra la arbaro ili iris sur paŝejo, kiam ŝtormo igis ilin atendi sub rokplato. Malheliĝis, la nokta mallumo proksimiĝis. La policistoj baldaŭ embarasiĝis pri la ĝusta direkto. Stojno rimarkis tion, kaj modeste proponis sian konon: „Vi devas scii, ke mi ne estas ribelulo, via komandanto certe liberigos min. Ankaŭ mi volas urĝe renkonti lin, tial mi kondukos vin, permesu! " Ili lasis sin konduki de Stojno por atingi konatan lokon antaŭ nokto. Kaj Stojno – rakontis la maljunulo – kondukis ilin al proksima fonto, apud kiu troviĝis kabano de revoluciuloj. Post kiam ili forigis la soifon, ĉirkaŭe estis jam alfiksitaj pafiloj, kaj sonis turke la averto de la patriotoj: „Levu la manojn! "

Ili ĉiuj: letero, Stojno, policistoj, ĉiuj ĉi venis en bonajn manojn! „Mi plenumis la lastan deziron de paĉjo" – diris kontentege Stojno al la armitaj patriotoj. Li restis kun ili kaj partoprenis la batalojn, ĝis sia arbara sonĝo iĝis triumfa realo, kaj li povis libere en libera lando reveni al patrino Todorka...

recenzoj * recenzoj

Juveloj en modesta vesto

Oldřich Knĺchal: Mediteme. Selekto el originala kaj tradukita prozo. (Panoramo. Literatura Almanako de STARTO.) Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Praha, 1980. 74 p. 21 cm.
Prezo por Hungario: 30,- forintoj.

Ĉeĥoslovakio ĉiam estis unu el la ĉefaj centroj de la Esperanta kulturo, kaj ĝi restas tio ankaŭ nun: Piĉ, Urbanová, Kořínek – por mencii nur la ĉie konatajn nomojn – agas en tiu lando. Kaj *Mediteme* konvinkas nin, ke Knĺchal ankaŭ apartenas al tiu verkista elito.

Ni povas legi en la malgranda volumo sep originalajn verkojn kaj kvar tradukaĵojn. Pri la lastaj ne estas diri ion profundan sen la kono de la Originalo – sendube ili legiĝas senstumble kaj havas tre firme regatan, kompaktan lingvaĵon.

La veran travivaĵon donas la originalaj prozaĵoj, verkoj de ĝenro nedifinebla: ili situas ie sur la limo de beletro kaj ĵurnalismo. En ĉiu peco

jam la unuaj linioj kreas tre karakterizan atmosferon, tamen mildan, modeste fonan. Knĺchal priverkas siajn temojn vere *mediteme,* kun plena respekto al la varieco de la reala mondo, evitante troajn emfazojn kaj ŝokan vervon. Tamen, tio neniel malpliigas la efikon de liaj vortoj, eĉ, la sordina tono kvazaŭ altigas la perceptkapablon de la leganto. Legi la skizojn de Knĺchal similas longe, silente rigardi akvarelan mutan naturon sur kremkolore tapetita muro.

La plej interesa peco de la libreto sendube estas la eseo pri la romano de Raymond Schwartz *Kiel akvo de l' rivero.* Ĉi tie Knĺchal montriĝas ne nur elstara kaj eleganta stilisto, sed ankaŭ akraokula kritikisto kaj erudicia konanto de la Esperanta beletro. Estus grava riĉiĝo por nia kritiko kaj literaturo ĝenerale, se li ekhavus emon same pritrakti aliajn originalajn romanojn.

V. *Benczik*

Post Kruko kaj Baniko

Louis Beaucaire: Fabeloj de la verda pigo. 110 p. 22 cm. Ilustraĵoj de Jean Effel kaj Stano Markovič. Eldonis: TK–Stafeto, Antverpeno–La Laguna, 1981.

Esperantaj fabeloj, kun dozoj da leĝera humuro kaj indulga ironio – jene oni povus etikedi mallonge tiun ĉi libron de la franca aŭtoro, kiu per siaj Bervalaj historioj jam eternigis sian nomon en Esperantujo.

Ĉi-kaze ne temas pri erotike spicitaj verkoj: eĉ prudaj legantoj povas sendanĝere ĝui mirindan historion pri milito ĝe supersignoj, pri samideano lupo, aŭ pri tio, ke oni ŝtelis la facilan venton de la esperantistoj (tamen la muroj de miljaroj restis sur sia loko).

Sed kiel venas en tiujn aferojn pigo? Kaj kial ĝi estas ĝuste verda? Nu, temas pri tio, ke la avo de tiu ĉi rakontema pigo naskiĝis en pola arbaro, ankaŭ la gepatroj ellernis la lingvon, do ĝi mem elrampis el la ovo jam kiel denaska esperantista pigo. Sur la frontpaĝo ĝi tamen ne estas verda, sed nur verdstelita – tamen la aŭtoro de tiu ĉi desegnaĵo estas neniu alia ol Jean *Effel*. La pigeco nur unufoje havas signifon en la libro, kiam la piga socio helpas puni konferencon de juĝistoj, kiuj obstine rifuzas uzi Esperanton, nome, la pigoj forŝtelas la kapaŭskultilojn, pere de kiuj la partoprenantoj de la konferenco povus interkompreniĝi.

En la ceteraj kazoj ricevas emfazon la esperantisteco de nia brava birdo, kiu kreas por ni kvazaŭ Esperantan mitologion, kun figuroj kiel la bona feino (Fund)Amenta, eĉ pretanta plenumi pacigan rolon en la participa batalo. La lingvajn diskutojn cetere komentas jene la rara birdo: „Mi, simpla pigo, opinias, ke tiel longe, dum esperantistaj moŝtoj komprenas la insultojn de aliaj esperantistaj moŝtoj, tio sufiĉas por pruvi la klarecon de nia lingvo internacia." Similaj „popolaj saĝaĵoj" ne maloftas el ĝia beko.

La agrable legindajn historietojn akompanas ĉirkaŭ kvindek tutpaĝaj karikaturaj desegnaĵoj, kiuj eminente harmonias kun la Beaucaire-aj stilo kaj prezentmaniero.

Libro rekomendinda por someraj ferioj, post nervoŝokaj diskutoj kun edzino, aŭ post/anstataŭ komitatkunsidoj.

V. *Benczik*

Notaĵoj de pasaĝero

Adalberto Huleŝ: Katoj kaj ĉevaloj. Originala poemaro. 80 p. 21 cm. Hungara Esperanto-Asocio. 1982. ISBN 963 571 100 X. Prezo: 12,- ned.gld.

Per tiu ĉi debuta kolekto Huleŝ regule pretigis koktelon el iom neegalaj ingrediencoj: amaraj gutoj de pesimismo, dolĉaj grajnoj de ironio. Ankaŭ la stilo tre varias – milde, provoke, tiel ke ne eblas etikedi, nek enskatoligi. Kontrastas eroj tradiciaj kun banaleskaj aŭ eĉ misformaj erupcioj apud modernismaj eksperimentoj de alta filozofia karato kiel *La granda vinbertretanto*, kiu egalanime tretadas la homsortojn kaj el la poetoj elpremas la poemojn...

Akvarelo

Staras nuptfraŭlin-pozaj
la rozaj
abrikotujoj.
Kiam sin
montros fin-fine la fianĉin'?

Tiu kaj kelkaj certe plej frue verkitaj poemoj pro sia ultrakurta naturetoso povas efiki japaneske. Rimitaj, jes. Sed tiom abrupte Huleŝ saltas for de rimoj kaj fiksaj formoj, ke li certe aprobas tiurilatan kritikon.

Ĝenerale rimoj fortigas, se ili portas la sencon kaj ne ĝene asonancas aŭ eĉ identas (regul' – regul' p. 24.) Laŭ *Katoj kaj ĉevaloj* ankoraŭ ne mortis la epoko de impotentaj adasismoj (soleco –koreco, havinta–ĵetinta, preterlasiĝu –burĝoniĝu) aŭ banalaj mi–vi–li–ni. Kaj kion diri pri langon-kontuzanta feliĉmiraĝ'–mesaĝ' p. 23.?

Ĝenas en tia altvalora poemaro praforma, superflua, singulta apostrofigo kaj interpunkciado sinsekve pedante tradicia aŭ tute mankanta. Kompreneble ĉiu „sistemo" estas tolerebla, sed nur kun minimumo de redakta konsekvenco. Meznivela leganto povas suspekti, ke iuj modernistoj, eble nur modanoj, ĝuste pro la jam nomitaj misaĵoj krom kapturniga inversio nepre *volas* sin malkomprenigi.

Spitante la obstaklojn oni tamen havas oran rekompencon. Pluraj klimaksoj portas al la konkludo, ke eldono de la lastaj subtilaj ĉapitroj eble sufiĉus! Sur tiuj maturaj paĝoj veriĝas:

Poeto vivas kaj mortiĝas,
ke malpli estu vi izola.

Sur samaj, konkludaj paĝoj la poeto – kvazaŭ kun sia leganto – sidante ĉe la kuranta rado en ceramikejo „kredas sin mem la Teron ruliĝantan ĉirkaŭ la suno..."

Post tia nektara ĝuo oni sentas embarason de verto ĝis piedfingroj legante pri Jesuo kiel kato, pri ĉevalstalo naĝanta en la aero k.a. – Galimatias p. 74 dektri-foja *dikfingron granda ĉeval'* – nur superita p. 56 per dudek-foja apliko de *juĝisto–juĝanto*. Ĉu eble la poeto pro urĝa bezono forlasis la skribmaŝinon, dum ĝi elektre pluproduktadis? *Tra-ta-ta-pum! Tra-ta-ta-pum! Tra-ta-ta-pum!* – Dankon pro tiu kaj aliaj onomatopeoj. Bonvena eĉ ĉiu aro de tute hazarde kneditaj vortoj. Saluton pro honesta dadaismo kiel

Se senorelaj orelumas,
tiam la pomoj ore lumas.
Se suno-reloj relo-amus,
tiam la pumoj are lamus.

Redaktoro/eldonanto de tia serioza, intelekta verko devus zorgi pri datigo de ĉapitroj aŭ stile kontraŭaj poemoj. Ĝuste ĉar temas pri evidenta evolulinio de talento, kelkaj jarciferoj povus esti tre signifaj. Por dua eldono ankaŭ decus priglosi latinajn esprimojn kaj prinoti uzitajn person-nomojn.

Spite al sia fabeleska titolo la kolekto lokiĝas sur alta, humanisma nivelo, kiu nenie kaj neniel lasas leganton indiferenta. Ne nur al ĉiu poezi-amanto sed al ĉiu kun intereso mezuri ĝis la limoj lingvaj de Esperanto indas rekomendi ĉi tiun verkon.

Poŭl *Thorsen*



VOJO AL LA KOMFORTO

BUBIV

BUDAPESTI BÚTORIPARI VÁLLALAT

1043 BUDAPEST, LÓRÁNTFFY ZS. U. 15/B

Meblovendejo VARIA, Budapest VII. Rózsa Ferenc u. 4-6.
Normomarka Meblovendejo BUBIV, Budapest III. Ezüsthegyi u. 2.



El «La Infana Raso»

En la ĉefaj linioj de nia enigmo (H.1., V.15.) ni citas kvar versojn el la XV-a ĉapitro de la eposo de William Auld. Ensendi sufiĉas la citafon. Limdato: unu monato post la alveno de la revuo. Inter solvantoj ni lotumos premiojn.

Horizontale: **15.** Neprilaborita, nepreparita **16.** Atenti, zorgi por eviti malbonon **17.** Duoble naŭ **18.** Pasinto **19.** Iomete diferenca formo de la sama kanto, poemo ktp. (R) **21.** Malofta **22.** Reen: antaŭnaŭa **23.** Uzata por mortero **24.** Satata ajlo-bulbo **26.** Senvokala montaro en Bulgario (R) **27.** Molibdeno **28.** Purigi ejon **29.** Altranga anĝelo (R) **31.** Kolekta sufikso **32.** Liberigos el danĝero **33.** Kavaliroj portis **35.** Loĝantoj de Eŭropa lando **37.** Ne min **38.** Verda legomo (R) **40.** Pri kio oni parolas aŭ verkas (plurale) **41.** Eklezia kunveno (R) **43.** Reen: greka litero **44.** Identaj vokaloj **45.** Ŝirmita kontraŭ infekta malsano (R) **46.** Uzinda por lave puriĝi **47.** Kultureblan kampon **50.** Kolektive **51.** Musĉasanto **52.** Kiun oni amas (R) **53.** Sekvas post la sepa **55.** Franca esperantisto, fondinto de V.46. **57.** Kare ŝatos iun **58.** Patroj de gepatroj **59.** Reen: numeralo **61.** Reen: verba finaĵo **62.** Malutilaj etaj mamuloj **64.** Moveti rapide kaj ripete (R) **65.** Genro de parazitaj insektoj **68.** Ne oceano (R) **69.** Armea estro (R) **70.** ...rato (tamen nobelo) **72.** Perdo de konscio **73.** Paŭlo Balkányi **75.** Supren **76.** Kolektado de mono **77.** Sufikso esprimanta la plej malaltan gradon **78.** Perforte akiri (R) **80.** Mikse: valormetalo **81.** Kelta lingvo en Skotlando **82.** Adverbo montranta superlativon **83.** Malplezura, pro senintereso **85.** Iama reĝlando preter Pireneoj (duobligu r!) **87.** Dikigas (R) **88.** Arĝentbrila metalo (R) **90.** Acida manĝaĵo (R) **91.** Elektra fajrero (R)

Vertikale: **2.** Rizbrando **3.** Nigrebruna fekunda tero **4.** Lirika poemo **5.** Kemia simbolo de masurio **6.** Havas saman kvanton **7.** Forigi herbaĉon **8.** Pli ol duo **9.** Kunaŭtorino de „Domfabriko" (... Csiszár) **10.** Malkaŝe esprimanta opinion (R) **11.** Senvokale inda **12** Metalo (R) **13.** Skabion kaŭzanta insekto (R) **14.** ...Prismo, iama literatura revuo **19.** Intermontaj lokoj **20.** Gardena altaĵo (R) **23.** Malplenaĵoj **25.** Legitimilo por vojaĝi eksterlande (R) **28.** Danckunvenon **29.** Homa brusto, trunkantaŭo **30.** Granda komerca kunveno **32.** Virnomo (R) **33.** Kinematografio **34.** Identaj konsonantoj **36.** Parto de daŭro (R) **37.** Ŝnura batilo **39.** Adamaj vokaloj **41.** Verko akre primokanta (R) **42.** Figuroj en kartludo **46.** E-organizo de „sennaciuloj" **48.** Aersimila substanco (R) **49.** Nespertulo, komencanto de profesio **51.** Bru-fara ilo **52.** Sekse ami (R) **54.** Havi klaran ideon pri io **56.** Stela **57.** Komenci batalon (R) **58.** Patrino de gepatroj **60.** Interjekcio **63.** ...iako (neagrabla gaso) **64.** Globa **66.** Kiel H.61. **67.** Elementon de skeleto **69.** Ovoforma **71.** Kiel V.20. **72.** Scio kaj lerteco pere de praktiko **74.** Trempis en akvon por lavi **76.** Enigmospeco (R) **77.** Malĝusta **79.** Volva fasketo da haroj (R) **81.** ...vezi-ko (parto de hepato) **82.** La du reloj kune (R) **84.** La unuaj vokaloj **86.** Reen: radiko de H.32. **87.** Gapas sen-vokale! **89.** Persona pronomo **91.** Konjunkcio

Solvo de la krucenigmo en n-ro 1982/4:
/Ho hom' pacema, reĝ' aŭ almozulo/
La kapon levu, tenu alte ĝin!
Heroo estas, kiu porti povos
La penson de la morto en la sin'!
(el *Memorskribo* de János Vajda, tr. K. Kalocsay)

Libropremion gajnis per lotumado: Marin *Bacev,* Sofio, BG; *Melnikov,* A.S., Rostov-Don, SU; *Szabó* Ervin, Mosonmagyaróvár, H. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj. **Averto:** se vi solvas ambaŭ enigmojn, bv. la solvojn de „Krucenigmo" kaj „Ekzameno" aparte sendi, aŭ en koverto, aŭ sur distrancĉeblaj duonpartoj de pk. ĉiujn kun presliteraj nomo kaj adreso! La redakcio aparte kontrolas kaj lotumas ilin!

Solvoj de la demandoj en n-ro 1982/4:

1. La filo de Jeva: Tomi.
2. Ne komprenas, nur parolas la lingvon: Idel.
3. Ŝatas ludi ŝakon: Jan. („Ĉu vi vidis jam la piedsignon de l' Profeto? " de János Elem.)

Libropremion gajnis per lotumado: *Bodnár* Marianna, Debrecen, H: Günter *Rudolph,* Erfurt, GDR. La librojn ni jam sendis al la gajnintoj.

Ekzameno sen risko

Ekzamenanto: Georgi Mihalkov

Lappar, la Antikristo
de Endre Tóth

Esperanto-legantoj bone konas la nomon de Endre Tóth. Liaj originalaj noveloj gajnis premiojn en pluraj literaturaj konkursoj. La temoj de liaj rakontoj, ĉu ŝvebe fantaziaj, ĉu korŝire realaj, estas ĉiam allogaj kaj interesaj.

1. Kiel nomiĝas la kvar knaboj en la novelo „Lappar, la Antikristo"?
2. Kiu novelo finiĝas per la frazo: „Ĉu indas atendi, kio okazos? "
3. Kio estis skribita sur la trancĉilo per kiu oni murdis la Bolivian ambasadoron?

Limdato por la respondoj: du monatoj post la alveno de la revuo.

Korespondi deziras

S-ino Inna *Soomaa* (21) librovendistino, pri . div. temoj. *Tallinn,* Võidu 56, Estonio, SU-200.012. – Inĝ. Heino *Kinkar* pri ŝakludo, filoj Toomas (13) kaj Kadri (11) pri sporto, lingvoj, bk. *Tallinn,* Ehitajate tee 23. SU-200.026. – F-inoj Katrin *Kaljurand* (15) kaj fratino Elena (12) pri sporto, literaturo, kol. kalendaretojn, bk. *Tallinn,* Keskuse 22, SU-200.029. – Stanislaw *Klim* (30) teknikisto, pri pentroarto, skulptado, arkitekturo. *Zabkowice Sl.* ul. Kusocinskiego 11/1. PL-57.200. – Witold *Piotrowski* (15) lernanto, ktm, pri bicikla turismo, kol. pm, bk kaj diapoz. *Wroclaw,* ul. R. Kocha 1A. PL-51-122. – S-ro Juan Antonio *Giménez Garcia* (45) instruisto, pri E-aĵoj, instrumetodoj k.a. *Valencia-7.* C/Callosa de Ensarria, 9-14. Hispanio. – Nadja *Kafevnikova* (24) studentino de romanagermana filologio, pri vivo de junularo, turismo, kol. bk. *Volzskij,* 11.m.r.d.4. kv.24. SU-404.123.

E-turista grupo invitas (senkoste) kelkajn junajn geespistojn el soc. landoj al 5-taga grimpado tra Kowkonoŝemontaro en majo. Skribu al Turista Sekcio de DEC, *Ziel. Góra,* H. Saviekiej 33/18. PL-65559. – Hungaraj gestudentoj dez. kor. ktm, pĉt. Studenta Rondo Esperanto, *Pécs,* Jakabhegyi u. 8. H-7624. – Julia *Martinovič* (33) invalido, ktm pri literaturo, historio, filozofio, hejmbestoj, E-movado, kol. bk, precipe kun invalidoj. *Lvov,* Naučnaja str. 15-29. SU-290.060. – S-ro André *Giovenal,* pri vojaĝoj, kongresoj, renkontoj, kol. pm, glumarkojn. *Lyon,* 60, rue M. Bastié, F-69008. – Studentino *Dangŭole* Tolušite (20) ktm, pĉt, interŝ. bk kaj insignojn. *Vilnius,* Saulėtekio 35-11, Litovio, SU-232.054. – F-ino *Osminina* Natalija (25) ktm, pĉt, interesoj muziko, ekskursoj, fotografio. *Klajpeda,* Igulos 24-60, Litovio, SU-235.818. – Franciska *Harmsen* farmaciistino, interesoj naturo, popolkutimoj, turismo, arto k.a. *Liepaja,* Rinku iela 25, Latvio SU-229.700. – S-ino Viivi *Reigam* (47) pri arto, literaturo, vivfilozofio, interŝ. bk, librojn, pm. *Tallinn,* str. Laulu 24A, Estonio SU-200.009. – Instruistino *Skurdenienė* Irena (26) ktm, pĉt, urbo *Panevėžys,* Grigo gt. 33-55, SU-Litovio (*erare* aperis en n-ro 1982/4).

LETERKESTO

Rudolf Zsoldos, Subotica, YU: Ankaŭ ni aliĝas al la gratulintoj, venintaj el multaj urboj al la E-Societo en Subotica por festi la 75-jaran jubileon de la tiea E-movado, la 14-an de novembro 1982. La ampleksa kaj plurfaceta programo de la solena kunsido, dum kiu ankaŭ faris paroladon eminentaj Jugoslaviaj esperantistoj, klare montras la tradician aktivecon de la vojevodiaj samideanoj. Ni rimarkis atendeme, kiel ili interkonsiliĝas pri la venontaj agadoj, prepari kaj sukcesigi la centjaran jubileon de nia lingvo inter plurlingva loĝantaro de via regiono. Dankon pro viaj informoj!

Norman Berdichevsky, Hösbjerg, Danlando: Nia fidela leganto jam frue esprimas sian deziron: ne nur partopreni en Budapeŝto la Kongreson, sed ankaŭ renkonti la redaktorojn de nia revuo. Ni esperu, ke ambaŭ viaj deziroj – kune kun aliaj agrablaj vojaĝplezuroj – bone sukcesos, kaj ni aŭskultos multajn dezirojn kaj... kritikojn. Do, ek!

Šaik B. Mamedov, Baku, SU: Eble estus pli trafe, se ni turnus nin al via edzino, Jekaterina Borisovna, ĉar ŝi tradukis la gajajn-plaĉajn anekdotojn pri *Nasreddin* (jen Molla, jen Hoĝa, jen eĉ en aliaj oficoj „funkciinta" petolulo). Baldaŭ ni informos pri konvena eblo de la utiligo de la tradukoj; kaj tute aparte ni lanĉas pro interesemo la demandon: ĉu en Azerbajĝanio estas verkataj originalaĵoj Nasreddinaj ankaŭ kun nuntempa temo?

Vasil I. Georgiev, Šumen, BG: Vi plenrajte postulas de H.V. legaĵojn pri la vidindaj interesaĵoj de Budapeŝto, kiujn vi povos vidi-viziti ĉi-somere okaze de UK. Kiel vi jam spertis, ni komencis artikolojn publiki por kontentigi tiajn postulojn: espereble ili donas iom da imago pri la vidindaĵoj. – Pri abonprezo de H.V. disponas sole la ŝtata gazetservo de via lando, la redakcio neniel influas ŝanĝojn de tiu prezo.

Georgi Dikovski, Sofio, BG: Vian odon pri la 60-a datreveno de la soveta ŝtato ni atente legis, ankaŭ tial, ĉar surprizis nin pluraj aŭdacaj „poeziaj licencoj" dum la interesa kaj entuziasma pensoarko. Publiki tamen ni jam ne povis ĝin, ĉar ĝi atingis nin tre malfrue, longe post la redaktofino de niaj pasintjaraj numeroj.

Shi Chengtai, Tai Lai, Činio: Kun granda danko ni ricevis la tradukitan novelon de la moderna aŭtoro *Cheng Feng,* kaj ni legis ĝin kun alta intereso. Bedaŭrinde, ni ne konas vian intencon koncerne la novelon (ĉu kritiki, korekti, ev. publiki?), sed kiel ajn estas, ni ĉiam havas veran plezuron ricevi leteron de legantoj el foraj landoj. *Cetere* ni devas atentigi tradukantojn de modernaj kaj vivantaj aŭtoroj: ili devas zorgi ankaŭ pri la kopirajto, ja tion nia redakcio ne kapablas akiri anstataŭ ili. Kun aparta atento ni sekvas la informojn pri la impone kreskanta ĉina E-movado: niaj modestaj gratuloj nun iras al nia tre estimata leganto!

Ladislav Chmelik, Prešov, CS: Estiminda plenumo ŝajnas via samtempa lingvolernado: hungare kaj Esperante surprize rapide vi atingis relative altajn ŝtupojn. Almenaŭ tion montras viaj dulingvaj tradukaĵoj, el kiuj precipe la hungarlingven transplantita poemo igas miri pro la perfekta lingvaĵo. Akceptu gratulon, ja, onidire, la hungara estas iomete pli malfacile lernebla ol Esperanto...

E. F.

HUNGARA VIVO

HUNGARA VIVO + Ĉefredaktoro: **Vilmos Benczik.** + Arta redaktoro: **Judit Somhegyi.** + Redakta komitato: **Szilárd Bálint, Ada Csiszár, Márton Fejes, Ervin Fenyvesi, István László, Georgi Mihalkov, Péter András Rados, Zsuzsa Varga-Haszonits.** + Ĉefkunlaborantoj: **Mihály Gergely, Ludoviko Kökény, Alfonso Pèchan, Aurel Ponori-Thewrewk, d-ro István Szerdahelyi.** + Budapest, pk. 193. H–1368. Telefono: 141-078, 334-194. + Eldonas: Hungara Esperanto-Asocio. + Respondeca eldonisto: **Tibor Vaskó.** + Disvastigas la Hungara Poŝto. Aboneblas en ĉiuj poŝtoficejoj, ĉe la gazetkolportistoj de la Centra Gazetoficejo de la Poŝto (K.H.I. 215–96-162, 1900 Budapest, József nádor tér 1.) senpere aŭ per poŝtmandato. + Abonprezo por jaro (ses numeroj) 78,- Ft, al eksterlando por unu jaro 96,- forintoj. + Peranto al eksterlando **KULTURA** (Budapest, P.O.B. 149, H–1389.) Abonprezo por unu jaro (ses numeroj) 11,- Usonaj dolaroj aŭ egalvalora sumo en alia valuto. + Presejo de Hungara Esperanto-Asocio, Budapest. Respondeca gvidanto: Tibor Vaskó.

Indexszám: 25 377 ISSN 0018–7704

Portebla magnetofono

kun kasedoj

BRG

MAGNETOFON

novajo ĴUDONSÁG!

HÉLIOS

Kolortelevidilo produktita per la plej moder
teknologio kaj funkcianta per
infraruĝa telemanipulado.
Taŭgas por alkonekti vidmagnetofonon.

Prezo: 29 800 Ft Garantia tempo
kiel ĉe ĉiuj Orion kolortelevidiloj – 3 jaroj!

19 aprila 1983

ORION TV RADIO